

Zagreba Esperantisto

ISSN 1846-5021

GAZETO DE
ZAGREBAJ ESPERANTISTOJ

ԹԻՒՆԵՅԵԿԻ
ՅՈՒՐԱՅԻՆՔՄԱՃՁՄԱՅ

Sur la foto: Kablotramo de Zagrebo

Ĉi-numere legu pri:

ĈIUJ AL BJELOVAR

(9-a LANDA KONGRESO EN 2011)

MIA KROATIADO

TURISMA ASOCIO DE ZAGREBO

FAVORAS ESPERANTON

NOVAJ EKSCIOJ PRI FRAN KOLAR

2

2010

Eldonanto:

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj
HR-10000 Zagreb, Goljak 43

**Ĉefa kaj respondeca
redaktoro:**

Radenko Milošević
Goljak 43
HR-10000 Zagreb
radenko.milosevic@zg.htnet.hr

Plenumredaktoro:

Josip Pleadin
B. Jelačića 138 A
HR-48350 Đurđevac
Kroatio
josip.pleadin@gmail.com

Ekspedejo:

Grafokom, p.p. 96
HR-48350 Đurđevac
Kroatio
grafokom@kc.htnet.hr
zagreba.esperantisto@gmail.com

Redakcianoj:

Snježana Habulin, Vida Jerman,
Jozo Marević, Radenko
Milošević, Velimir Piškorec,
Josip Pleadin, Mato Špekuljak

Presis:

Grafokom, Đurđevac

Aperritmo:

Neregula

Konto de UZE:

2340009-1110321529
(Privredna banka, Zagreb)

UEA-kodo:

uzes-y

RESUMO

Jarfine ni prezentas al vi novan numeron de nia revuo. Kelkaj ĉefaj temoj eble kaptos vian atenton. Komenciĝis preparoj por la sekvontprintempa 9-a kongreso de kroataj esperantistoj, en urbo kun longa Esperanta tradicio, sed la urbo kie neniam okazis jugoslavia aŭ kroata Esperanto-kongreso. Bjelovar per la kongreso volas omaĝi al Fran Kolar kaj al 100-jariĝo de apero de lia traduko "La trezoro de l' orajisto". Lastatempe ni malkovris multajn nekonatajn faktojn el la vivo de Fran Kolar, sed plej surprize: ni trovis ankaŭ lian nepinon kiu vizitos nian kongreson en Bjelovar. Pri tiu temo legu eĉ du longajn artikolojn.

Plurpaĝa vojaĝpriskriba artikolo prezentos al vi nian landon viditan per la okuloj de nia Esperanto-gastino el Litovio. Bona okazo ankaŭ por rimarkigi, ke Turisma Asocio de Zagrebo favoras Esperanton por turismaj celoj. Ni sukcesis ricevi la ekskluzivan intervjuon kun la direktorino de Turisma Asocio de Zagrebo, sinjorino Amelia Tomašević.

Pri la kroata statuo de urso en Helsinko, jen malgranda (foto)raporto de nia finna kunlaborantino.

Inter belaj novaĵoj troviĝas ankaŭ la malĝojigaj: la forpaso de la "bardino" de kroata poezio Vesna Parun, kaj la forpaso de pluraj niaj samideanoj.

Pri la respektinda aĝo de la zagreba vidindaĵo - ĝia kablotramo - parolas la artikolo okaze de ĝia 120-jariĝo.

La Estraro de KEL pridiskutis sian eblan kandidatiĝon por la projektoj de Grundtvig. Ĉi-numere legu pri la spertoj kaj sukcesoj de niaj polaj kolegoj.

Kiel kutime, ni informas ankaŭ pri la eventoj el la najbaraj landoj, ĉi-foje el Bosnio kaj Hercegovino, kaj en la telegrafmaniera raporto ni informas vin pri multaj interesaj eventoj en la landa kaj eksterlanda movadoj.

La literatura parto alportas al vi du recenzojn. Unu el ili prikomentas la novan libron de interesa kaj nesufiĉe konata itala originala Esperanto-verkisto Sen Rodin, kaj la dua pritaksas la ĵus aperintan tradukon de Roger Imbert "La verda tritiko" el la franca literaturo, kiu atendis sian libroforman aperigon dum jardekoj.

Dezirante al vi sukcesan kaj prosperan jaron 2011, ni invitas vin daŭre amiki kun "Zagreba Esperantisto". Aparte ni akcentas la kongresan devizon de la 9-a kongreso de kroataj esperantistoj: ĈIUJ AL BJELOVAR! Bjelovar fariĝu la plej grava celo de nia printempo en 2011.

Ĝis la sekvonta numero, salutas vin

ĈIUJ AL BJELOVAR!

📖 LKK de la 9-a kongreso

La ĉi-supra titolo estu slogano, kiu instigos nin (re)riprensi: kion por ni esperantistoj signifas niaj kongresoj? Esperantistaj kongresoj ĉiam estis eventoj de eksterordinara graveco, la tempo dum kiu esperantistoj unufoje jare renkontiĝas ne nur por intervidiĝi, sed por senti sin unuecaj, senti sin parto de la sama movado. Se al neniu alia aranĝo oni povas aliĝi, almenaŭ al landaj kongresoj ni venu! En la kongresoj oni diskutas pri gravaj movadaj aferoj, pri la problemoj kiuj ne malofte okupas nian malgrandan



komunumon, tie oni prezentiĝas per siaj kulturaj, literaturaj, artaj kaj eldonaj atingoj. Tie oni disdonas diplomojn por la sukcesaj samideanoj, premiojn por la eksterordinare sukcesaj ... La kongresa tempo estas rezervita por planadoj, por ĝermado de novaj ideoj, por amika kunestado, kulturo, arto, por turisma konatiĝo kun la gastiganta regiono. Ĝi estas kaj estu la centro de nia esperantumado.

Pro ĉio ĉi do ni ripetu: "Ĉiuj al Bjelovar!" la 14-an kaj la 15-an de majo 2011. La fervora LKK jam kalkulas ankaŭ pri vi, kiu legas ĉi tiun tekston, ĉar la legado signifas, ke vi interesiĝas pri la temo! Ne atendu aliajn aliĝi, sed vi estu inter la unuaj aliĝintoj! La aliaj sekvu vian ekzemplon!

La bjelovara LKK optimismas! Ĝi starigis antaŭ sin la tre postuleman celon: atingi la nombron de 150 kongresanoj. Ĉu vi pretas agi por la sama celo? Ĉu vi pretas konstrui kun ni nian revon kaj finkonstrui ĝin?

Per frua aliĝo, per frua pago de via kotizo, vi ja mem kontribuos pli ol vi imagas: vi plantos ankaŭ al aliaj fidon, ke ni vere ĉiuj ("ni" signifas - kroataj esperantistoj, sed ankaŭ alilandaj samideanoj kiuj deziras ĝui la belajn kongresajn momentojn inter ni) sentas sin unuecaj, sentas sin laborantoj por la sama afero. Se vi ne estas certa ke vi povos partopreni, tamen aliĝu, kaj per via kongresa kotizo helpu la kreskon de bona

volito, la kreskon de optimismo en niaj vicoj, la alproksimiĝon al la nombro de 150 gekongresanoj! Eble la kreskanta entuziasmo ankaŭ vin, eĉ se lastmomente, venigos al Bjelovar!

En la bjelovaraj stratoj ni estu facile rekonebla amaso, anstataŭ malgranda grupeto de nekonataj turistoj. Ni prezentiĝu al Bjelovar, la malnova lulilo de Esperanto, kiel aktivaj, kulturaj kaj amikemaj vizitantoj. Bjelovar, la urbo en kiu vivis Fran Kolar - Krom (kun sia sendiskute Esperanta kromnomo), kiu tradukis kaj proprakoste publikigis en 1911 la unuan libroforman tradukon el la kroata literaturo, la romanon "La trezoro de l' orajisto", meritas nian viziton kaj nian atenton. Per nia kongreso ni manifestaciu nian pretecon daŭre labori por Esperanto, kvankam la nuntempaj cirkonstancoj estas malfavoraj (sed kiam la cirkonstancoj por esperantistoj estis escepte favoraj?). Per niaj kongresaj programoj ni omaĝu la 100-jariĝon de la apero de la Kolar-a traduko! Sed, antaŭ ĉio, ni prezentiĝu kiel veraj esperantistoj, tiuj kiuj semas la belan ideon de amikeco, la ideon de internacia interkompreniĝo per neŭtrala lingvo Esperanto, sed ne nur per frazoj - ni faru tion per agoj! Per agoj en Bjelovar!

Do, ĈIUJ AL BJELOVAR!

Ĝis la revido en la 9-a kongreso de kroataj esperantistoj!

PRI LA URBO

Bjelovar (42.000 enloĝantoj) estas la urbo en nordokcidenta Kroatio, administra centro de Departamento Bjelovar-Križevci. Ĝi estas unu el pli novaj kroataj urboj, konstruita en 1756 per la decido de la imperiestrino Maria Theresia. Ĝi estas laŭplane konstruita, kun regula kvadrata strukturo de urbocentraj stratoj. Konata laŭ plurjarcenta produktado de lakto kaj fromaĝo, ĝi portas la epiteton de "fromaĝurbo". La urbo kuŝas sur altebenaĵo en la suda parto de la monto Bilogora, sur 135 metroj super marnivelo. Bjelovar estas trafika kruciĝejo kaj kultura centro de pli vasta regiono. La klimato estas modere kontinenta. Esperanto havas longan tradicion en la urbo, kiu komenciĝis en 1906 per posteniĝo de financa konsilisto Fran Kolar - Krom en la tiea Financa Direkcio. Per lia laboro tie fondiĝis Esperanto-societo en 1909, kaj post tre tumultaj ŝanĝoj, la societo definitive estingiĝis en 1992. Tamen la populareco de Esperanto en la urbo ankoraŭ estas evidenta, kaj individuaj esperantistoj ankoraŭ aktivas.



La urba blazono de Bjelovar

PRI LA KONGRESO

La 9-a kongreso de kroataj esperantistoj okazonta en Bjelovar la 14-an kaj 15-an de majo 2011 celas omaĝi al la apero de la unua libroforma traduko el kroatia literaturo, respektive la verkon "La trezoro de l' orajisto", kiun tradukis kaj en 1911 publikigis Fran Kolar-Krom. Kun tia ideo grupo de lokaj esperantistoj sendis sian alvokon al Kroata Esperanto-Ligo, kiu en oktobro 2010 akceptis la inviton. Kiel kongresejo servos la urba kulturdomo (vidu la foton dekstre).



La Kulturdomo de Bjelovar - nia estonta kongresejo

PRI LA LKK




Paerto de la bjelovara LKK (de maldekstre): Zdenka Polašek, Marija Kapelac, Josip Pleadin, Ljerka Stilinović kaj Nenad Margetić. Sur la foto mankas Grozdana Grubišić-Popović, Željko Saks kaj Franjo Forjan.

La unua kunsido de la iniciata grupo okazis la 18-an de oktobro en la dolĉaĵejo "Zagorec" en Bjelovar. Ĉeestis Grozdana Grubišić-Popović, Marija Kapelac, Nenad Margetić, Josip Pleadin, Zdenka Polašek kaj Ljerka Stilinović. La dua kunsido okazis samloke la 15-an de novembro kaj dum ĝi konstituiĝis la Loka kongresa komitato en la jam menciita konsisto. La duan kunsidon ĉeestis ankaŭ s-ro Željko Saks kiel kunlaboranto por la planita filatela ekspozicio, kiu dum la 3-a kunsido, okazinta la 16-an de decembro 2010 estis elektita kiel LKK-ano. Por la prezidanto de la LKK estis konfirmita Ljerka Stilinović, dum la aliaj membroj provizore ne havas difinitajn labortaskojn. Inter la unua kaj la dua kunsidoj okazis jam interparoloj kun la urbestro de Bjelovar s-ro Antun Korušec kaj kun kelkaj potencialaj sponsoroj. Kiel la kongresaj datoj estas elektitaj la 14-a kaj 15-a de majo 2011. En la LKK-on inter la 3-a kaj 4-a kunsidoj estis akceptita ankaŭ s-ro Franjo Forjan.

NOVAJ EKSCIOJ PRI FRAN KOLAR

Dum kelkaj pasintaj jaroj pliintensiĝis kaj pliprofundigis esploroj pri la plej fruaj pioniroj de Esperanto en Kroatio, tre verŝajne instigitaj per centjariĝo de la landa Esperanto-movado. Post esploroj pri la pioniro Mavro Špicer faritaj de Velimir Piškorec, sekvis detalaj esploroj pri la t.n. Osijekka kvinopo plenumitaj de Davor Klobučar, akiro de foto-materialo pri Danica Bedeković, kaj fine en "Tempo" n-ro 108 ni legas ankaŭ la tekston de Spomenka Štimec pri Antonija Jožičić. Al tiu aro da esploroj aliĝas ankaŭ mia esploro pri **Fran Kolar - Krom**, en kiu la enorma progreso okazis apenaŭ dum novembro kaj decembro 2010, kiam finfine, post multaj klopodoj, estis trovita lia nepino Mirjana Hnilička, pensiita farmaciisto, vivanta en Beogrado, cetere la lasta posteulo de tiu familio. La nepino estas trovita post ricevita respondo de la Zemuna tombejo, kie Fran Kolar estis entombigita en 1927. Mi sendis retmesaĝon al la tombejo por esplori ĉu lia tombo ankoraŭ ekzistas, kaj la bonvolema oficisto de la Zemuna tombejo indikis, ke temas pri la tombo numero 610 en la parcelo 16, kaj ke ĝin nuntempe posedas Mirjana Hnilička. Ricevinte de la tombejo ankaŭ ŝian poŝtan adreson, mi sendis rekomenditan



Portreto de Fran Kolar (detalo de olepentraĵo troviĝanta ĉe lia nepino Mirjana Hnilička en Beogrado)

leteron, al kiu mi tre baldaŭ ricevis retmesaĝan respondon de agrable surprizita nepino, preta helpi al mi en miaj esploroj. En aparta ĉi-numera artikolo (paĝoj 52-54) legu intervjuon kiun kun ŝi faris nia kunlaboranto Dimitrije Janičić.


Mian scivolemon Fran Kolar altiris pro la fakto, ke en lia konata biografio kiel lia naskiĝloko estas menciita Đurđevac, la

✍ Josip Pleadin

urbeto kie mi vivas. Post akiro de pluraj dokumentoj, mi devis konstati, ke tiu informo estas malĝusta, verŝajne kaŭzita per la fakto ke lia naskiĝloko *apartenis* al la distrikto de Đurđevac. Laŭ la aŭtenta dokumento ricevita de la paroĥestro de Đurđevac, Kolar sendiskute estas enskribita en la libro *Status Animarum* en Đurđevac, sed kiel almigrinto. Laŭ tiu fonto ne eblas ekscii la lokon de lia naskiĝo, sed laŭ la lernejaj dokumentoj li naskiĝis la 8-an (ne la 7-an kiel estis skribite en la nekrologo en "Konkordo" verkita de Branko Rajšić) de marto 1877 en la vilaĝo Sedlarica, kiu nuntempe teritorie apartenas al Pitomača. Lia patro Bolto estis pensiita arbargardisto, dum pri la patrino ne ekzistas informoj. La familio estis kroata kaj romkatolika.

En la tempo de lia naskiĝo, Sedlarica havis iom pli ol 500 enloĝantojn, tro malmulte por havi propran lernejon, kaj do li frekventis elementan (popolan) lernejon en la proksima vilaĝo Turnašica (inter 1883 kaj 1885). Komence de la lernojaroj 1885/86, sed pli precize ekde la 1-a de oktobro 1885 li eklernis en la popola lernejo en Đurđevac. Lia nomo troviĝas en la libro *Glavni imenik (matica) školskih sposobnjakah od godine 1881. do godine 1894.* sub la numero 415. Li loĝis ĉe la domnumero 156 en Đurđevac.

Post la finita popola lernejo, en la lernojaroj 1888/89 li ekfrekventis la Reĝan malgrandan realan gimnazion en Bjelovar, kien li enskribiĝis surbaze de la atestilo pri la finita 4-a klaso de popollernejo en Đurđevac kiun li finis en la lerneja jaro 1886/1887. En la unua gimnazia klaso li loĝis ĉe la bjelovara pedelo Stjepan Dumić kaj estis stipendiita per 170 forintoj el la Fonduso de piuloj, kiun al li atribuis la zagreba Ĉefepiskopejo la 24-an de septembro 1888. La stipendion li



Situo de Sedlarica, la naskiĝloko de Fran Kolar

Selo: *Gjurgjevac*

Broj: <i>361</i>		Godina, mjesec i dan			
Obiteljsko slovo	Ime kući	rođenja	vjenčanja	smrti	potvrđenja
<i>A a</i>	<i>Kolar</i>	<i>15/1874</i>	<i>30/8 1896</i>	<i>29/6 1933</i>	
<i>A +</i>	<i>Andrija</i>	<i>15/1874</i>	<i>30/8 1896</i>	<i>29/6 1933</i>	
<i>A +</i>	<i>Bara Turčec</i>	<i>1876</i>		<i>7/5 1947</i>	
<i>B a</i>	<i>Franjo</i>	<i>8/3 1877</i>	<i>28/7 1904</i>		
<i>B</i>	<i>Slava Godina</i>	<i>2/6 1878</i>			
<i>b</i>	<i>Marija-Meda</i>	<i>14/1912</i>			

Fotokopio originala!

03-04-2008



Fotokopio el Status Animarum en Durđevac

ricevadis de 1888 ĝis 1892. Dum la du lastaj lernojaroj la stipendion al li pagadis la Fonduso de kanoniko Belobrč.

La Reĝan malgrandan realan gimnazion do li finis en Bjelovar en la larneja jaro 1891/1892.

Post tio sekvas lia studado en la zagreba Jursciencia fakultato, sed ekzistas tempa disproporcio ankoraŭ neklarigebla pro manko de dokumentoj. Laŭ sobra pripensado, Kolar devis fini la jurajn studojn antaŭ ol li geedziĝis, do antaŭ 1904. Sed, supozeble ankaŭ multe pli frue.

Laŭ Status animarum el la paroĥo Durđevac, estas evidente, ke la 26-an de julio 1904 li edziĝis al Slava Godina (nask. la 21-an de junio 1878) sen indiko de loko. En la komenco de miaj esploroj mi volis pruvi ke ili geedziĝis en Durđevac, sed tio montrigis nepruvebla pro manko de dokumentoj. Fran Kolar konis sian estontan edzinon multe pli frue ol ili geedziĝis. Pravas tion la poemo kiun li verkis kaj skribis en ŝia memorlibreto en Zagrebo, en la jaro 1898. Laŭ la rakontado de

lia nepino, ili konatiĝis kiam Slava estis ĉirkaŭ 17-jara (do en 1895), sed temas pri la rakonto por kiu ne ekzistas konkretaj pruvoj. Tamen, ili devis konatiĝi almenaŭ en la jaro 1898, kiam Fran skribis al ŝi la akrostikan poemon. Onidire ili konatiĝis dum la ekskurso de iliaj turistaj grupoj al Venecio. Tiam ili ambaŭ vivis en Triesto, kie ili

ankaŭ geedziĝis en 1904. Nun por pruvi tiun fakton la triestaj esperantistoj serĉas respektivan dokumenton. Tamen klaras, ke en 1898 Fran (kaj Slava) vivis en Zagrebo, en 1904 ili vivis en Triesto, kaj en 1906 en Bjelovar. Povas do esti, ke post la finita fakultato, Fran officis en Triesto, kie dum tiu tempo vivis amaso da kroatoj kaj slovenoj, sed post la geedziĝo en 1904, li eble ricevis pli bonan postenon en Bjelovar.

La unua kaj la sola ilia infano estis la filino Marija-Breda (naskita la 12-an de januaro 1912, supozeble en Bjelovar, ĉar tiam Kolar jam estis financkonsilisto en tiu urbo kaj aktiva esperantisto).

El lia ĝis nun konata biografio ni ekscias, ke li ekoficis en Bjelovar en la jaro 1906, kaj vivis tie ĝis 1919, do pli-malpli 13 jarojn.

Estus interese prilumi la tempon de lia studado en Zagrebo, do la tempon ekde 1892 ĝis inkluzive 1904 (12 jarojn, kio sendiskute ne estis necesa por fini la studojn). Je mia demando pri tiu temo, sendita al Jura fakultato de Zagrebo en aprilo 2008, la fakultato respondis ke ili ne disponas pri la petitaj informoj, kiuj eventuale troveblus en Kroata ŝtata arkivo en Zagrebo.

Kolar profesie estis konsilisto/inspektisto de Financa Direkcio, retradukita al la nuntempa lingvo - funkciulo de imposta oficejo.

Laŭ lia konata biografio,

Br. 13.	Uĉenikovo	Školarinu plada ili je oprošten odpisom	Kalko je primljen?
prezime:	<i>Kolar</i>	I. polgod. <i>placi</i>	<i>na osnovu izjavega pisne škole u Gjurgjevacu.</i>
line:	<i>Franjo</i>	II. polgod. <i>oprešten</i>	
dan, mjesec i god. rođenja, mu:	<i>8. ožujka 1878</i>	<i>28/3. 89. b. 3261</i>	
mjesto rođenja:	<i>Jeđlanica</i>	Stipendija	Izvadak iz svjedodbe od drugdje donesene
domovina mu:	<i>Hrvatska</i>	kakva, kolika, čijom i kojom odlukom podijeljena?	
vjeroispoviest mu:	<i>rimokatolička</i>	<i>Polovina 100 kor. za bladu, polovina podijeljena u vjerske škole u Zagrebu 2/11. 1898. no 3 243/100 za realu.</i>	
materinski mu jezik:	<i>hrvatski</i>		
Ime	<i>Olca (malere)</i>	skrbnika	odgovornoga priglednika
staloš	<i>Bolto</i>		<i>Drušić Stj.</i>
mjesto prebivališta (dani)	<i>u dr. mjestu u mjestu Gjurgjevac</i>		<i>podvornik</i>
		I. polgodistišta	II. polgodistišta
Obći red napredka	<i>pravi</i>	<i>pravi</i>	Bilješke
vlađanje:	<i>pohvalno</i>	<i>pohvalno</i>	
marljivost:	<i>dostojna</i>	<i>postojana</i>	

Fotokopio de gimnazia dokumento el Bjelovar



kun Esperanto li konatiĝis en Zagrebo en 1905, sen pliaj indikoj, kio signifus, ke post sia geedziĝo en Triesto, la novgeedzaj revenis al Zagrebo, kie Slava havis familianojn kaj parencojn. Tamen, por tiu periodo la historiisto Marinko Gjiivoje mencias nur kelkajn esperantistojn (Vladimir Vidrić, Bogdan Vulaković), sed ne Kolar-on. Tamen, tro multas la ligoj inter Esperanto kaj Jurscienca fakultato de Zagrebo, kio stimulas nin esplori ĉu eble ĝuste la Jurscienca fakultato estis la unua ĝermego de esperantistoj en Kroatio?

Esplorante la neesperantan historion, oni ekscias, ke en la jaro 1895 (la jaro de la supozata konatiĝo de Slava kaj Fran!) okazis protesto de studentoj de la zagreba Jurscienca fakultato, kiu kulminis per bruligo de hungara flago en Zagrebo. Estis ĝuste la tempo kiam Kolar laŭ niaj supozoj studis tie (verŝajne en la tria studjaro), kaj inter la studentoj-konspirantoj troviĝis ankaŭ Vladimir Vidrić (poeto, konata kiel esperantisto) kaj Stjepan Radić (politikisto, posta ministro pri klerigado en la Reĝlando de Serboj, Kroatoj kaj Slovenoj, kiu promesis enkonduki Esperanton en ĉiujn komercajn lernejojn; vidu la artikolon en "Zagreba Esperantisto" n-ro 2008: 4). Tamen, la jaro 1895 estas tro frua por lerni Esperanton. Vidrić lernis ĝin nur dek jarojn poste, kaj Radić ne indikas la jaron kiam li lernis Esperanton. Sed, ankoraŭ unu koincido ligas tiun eventon kun Esperanto kaj Kolar. Al la studentoj-konspirantoj per verdikto estis malpermesite daŭrigi la studadon en Zagrebo, kaj ili devis ŝanĝi loĝlokon. Kiam Kolar fondis Esperanto-societon en Bjelovar (1909), inter la estraranoj de tiu societo troviĝis ankaŭ Martin Pavelić, unu el la zagrebaĵ studentoj-konspirantoj el 1895. Kolar mem fariĝis tre grava impost-inspektoro en la Reĝlando en kiu lia konatulo el studentaj jaroj, Stjepan Radić, fariĝis ministro, kaj ambaŭ estis esperantistoj! Pro tio eble cirkulis la malĝusta onidiro, ke Kolar estis alte rangita oficisto, iasence vicministro.

Tute certas la fakto, ke Kolar en 1906 jam estis aktiva esperantisto. Li verkadis



artikolojn por la bjelovara gazeto "Nezavisnost". Grupo da esperantistoj en Bjelovar ĉirkaŭ li ekzistis jam en 1906/1907, sed la societo estis fondita en 1909, pri kio atestas la artikolo en "Kroata Esperantisto" n-ro 2/1909. Kolar estis prezidanto de la bjelovara societo, kaj lia edzino Slava estis kasistino. Regulan Esperanto-rubrikon Kolar komencis verki por "Nezavisnost" ekde 1909.

Dum la jaro 1910 aŭ jam ekde 1909, Kolar komencis traduki la romanon de la kroata verkisto August Šenoa "La trezoro de l'orajisto" kaj li proprakoste

publikigis ĝin en 1911 en la zagreba eldonejo de Antun Scholz, en Gajeva strato 7. Tiu verko, de post kies apero pasis jam unu jarcento, estis la unua libroforma literatura verko tradukita el la kroata literaturo.

Interese por mencii estas, ke per sia letero el Varsovio de la 24-a de septembro 1910, la pozitivan opinion pri la traduko sendis al li la konata stilisto Kabe (Kazimierz Bein). Tio kuraĝigis lin por eldoni la verkon, sed pro la reago de la recenzistoj, li certe estis tre malagrabla surprizita.

La tradukon Kolar subskribis jene: "El la kroata lingvo tradukis Fran Kolar - Krom". Lia vera nomo estis Franjo, sed laŭ la tiama kutimo, tiu nomo estis mallongigita al Fran. Tamen, la deveno de lia kromnomo (evidente Esperanta), ankoraŭ ne estas definitive konata. La nepino Mirjana Hnilička pri tiu temo diras, ke ŝia patrino Breda aludis, ke temas pri intence elektita nomo kiu apartigus la profesion laboron de Fran Kolar disde lia hobbio (kromokupo) - Esperanto.

La tradukon de "La trezoro de l'orajisto" li eldonis, verŝajne ankaŭ pro la letero de Kabe, plene kredante pri ĝia sukceso, sed la tiama gazetaro preskaŭ senescepte aperigis negativajn recenzojn, kiuj aparte concernis la prezerarojn kaj uzitajn "idiotismojn", respektive



Slava kaj Fran Kolar kun sia solfilino Breda, supozeble en la jaro 1914 en Bjelovar

naclingvaj stilfigurojn. En januaro 1912 aperis la modeste negativa recenzo de Antoni Grabowski en "Pola Esperantisto" (n-ro 58). Alia recenzisto, subskribita per Verto, aperigis kritikon en "Esperanto" (organo de UEA), kaj ankaŭ la recenzisto de "Verda standardo" reagis same. Tamen neniu kritiko kompareblas per sia akreco kun la pritakso de la recenzisto de "The British Esperantist" (n-ro 90, junio 1912). La subskribinto Norémac (=Percy James Cameron), nomis la tradukon "egala al nulo", pro kio Fran Kolar sendis al la redakcio la 13-an de aprilo 1912 leteron (skribitan en Bjelovar). En tiu letero Fran Kolar mencias la pozitivan pritakson de Kabe, kaj aliajn du "bonegajn kroatajn esperantistojn" kiuj tralegis la manuskripton, sen menci la nomojn. Rigardate el la hodiaŭa vidpunkto, kvankam la traduko evidente ne estas perfekta, tamen nekontesteble ĝi estas la unua libroforma kroata literatura eldono en Esperanto. Kontraŭargumente, oni povus kompari ankaŭ la uzatajn naclingvajn idiotismojn de aliaj, tiutempe famaj stilistoj el grandaj literaturoj kiel la angal, franca, germana kaj pola.

Pri la familio de Fran Kolar ni ekscias ankaŭ, ke li havis la fraton Andrija (naskita la 15-an de februaro 1874 kaj mortinta la 29-an de junio 1933). Andrija edziĝis la 30-an de aŭgusto 1896 al Roza Dorčec (15-a de januaro 1876 - 28-a de majo 1947).

Per pliaj esploroj en la kadastra oficejo de Đurđevac mi eksciis, ke la 23-an de majo 1887, la patro de Fran Kolar aĉetis la domon en Đurđevac, evidente ankaŭ pro la bezono de edukado de la filoj. Tiu domo troviĝis ĉe la nuna adreso en strato de Antun Radić n-ro 13. Mi sukcesis havigi la kopiojn de kadastraj mapoj el la jaro 1889, sur kiuj ja klare videblas la situo de la domo, kiu estis malkonstruita en 1970-aj jaroj. En tiu domo tamen Fran Kolar ne vivis longe, eble nur ĝis ekfrekvento de la gimnazio en Bjelovar (2-3 jarojn).

Laŭ tiamaj kutimoj, el la du fratoj, unu heredis la patran posedaĵon (Andrija), dum la alia (Fran) edukiĝis. En la jaro 1902 estis notite, ke la kunposedantoj fariĝis la fratoj Andrija kaj Fran, sed en



Fran kiel kaporalo de aŭstri-hungara armeo fotita en Zagrebo (maldekstre) kaj kiel financinspektisto (dekstre)

1909 Fran definitive cedis sian posedaĵon al sia frato.

Laŭ la ekzistantaj fotoj pri la soldatservo de Fran, ni povas konstati, ke li estis kaporalo de

aŭstri-hungara armeo, verŝajne servinta en Zagrebo. Ĉu li partoprenis la unuan mondmiliton kaj en kiu(j) batalejo(j) kaj trupoj, ne estas ĝis nun konate.

Pri lia kariera avanco, ekzistas nur la noto en "Zemuna esperantisto" n-ro 3/1913, ke la tiama financministro promociis lin el "helpa sekretario ĉe la financa direkcio en Belovar", al "financa sekretario".

Post la unua mondmilito transformiĝis ankaŭ la ĝistiamaj imposta sistemo, kaj li estis sendita kiel Financministeria inspektoro de Reĝlando de Serboj, Kroatoj kaj Slovenoj al Beogrado, sed ekloĝis en Zemun. De post la jaro 1923 li praktikis kiel financa advokato. Tuj post sia alveno al Zemun, li estis tre aktiva en la loka societo, kaj fariĝis ĝia vicprezidanto. Bedaŭrinde, sian kontribuon li povis doni al tiu societo nur dum 7-8 jaroj, ĉar li mortis en aĝo de 50 jaroj pro rena inflamo (nefrito), la 12-an de aŭgusto 1927. Pli detala nekrologo verkita de la konata zemuna esperantisto Branko Rajšić ekzistas en "Konkordo" n-ro 7-8 (julio-aŭgusto 1927). En ĝi estas detale kaj en kortuŝa tono priskribita la entombigo kaj liaj lastaj tagoj.



La tombo de Fran Kolar en la Zemuna tombejo, fotita de Adem Jakupović

MIA KROATIADO

Nijolè Petraitytė

Enkadre de la 8-a kongreso de kroataj esperantistoj en Velika Gorica, dum septembro 2010 mi gastis en Kroatio kaj Slovenio. Esperantistoj de Kroatio famas pro la kultura kaj scienca agado. Zagrebo jam dufoje gastigis la Universalajn Kongresojn. Fakuloj pri la Internacia Lingvo realigas inĝenie internaciajn edukajn programojn. Societoj estas fortaj, kaj en ilia agado partoprenas multaj kleruloj, kiuj aranĝas konferencojn, seminariojn, literaturajn kunvenojn.

Ĉiu urbo havas proprajn tradiciojn kaj scipovas prezenti ilin. Ekzemple, Osijek fieras, ke ili estas antaŭuloj de la Esperanto-movado en Kroatio, kaj ili preparis historiografiajn verkojn. Pasintjare tie ĉi estis proklamita Esperanto-strato. En Kostrena, apude Rijeka, funkcias "Esperanta domo", kie ĉiujare okazas junulara konkurso "Pokalo Kostrena" pri konono de Esperanto inter element- kaj mezlernejoj.

Kroatoj gesamideanoj estas volontulemaj kaj bonfaremaj. Fare de ili okazas popularaj literaturaj kunvenoj kun verkistoj en la bieno Njeguš (vilaĝo Hraščina). Konojn kaj originalecon oni povas lerni en la moderna Dokumenta Esperanto-Centro, kiun fondis Josip Pleadin en malgranda norda urbeto Đurđevac.

Mi komunikis kun multaj atentemaj geloĝantoj de Kroatio. Por mi kiel fakulino pri kulturo estis plej interesaj la heredaĵlokoj kaj temoj pri interkulturaj rilatoj. Mia vojaĝo daŭris tra malpli konataj centraj kaj nordokcidentaj regionoj en Kroatio, respektive tra Turopolje, Podravina, Zagorje, Prigorje, kaj mi ekvidis la plej antikvajn kulturaj monumentojn sur la insuloj Krk kaj Veliki Brijuni, vizitis multnombrajn muzeojn, gastis en kelkaj municipaj bibliotekoj kaj en Esperanta arkivo. Mi proponas al la legantoj vojaĝskizojn pri multaj valoraj impresoj kaj spertoj. Ekvidinte la belecon de naturo kaj de monumentoj, la manieron de komunikado en la malgranda eŭropa ŝtato Kroatio, mi komparis ilin kun Litovio. Ja ni estas similaj ŝtatoj laŭ grandeco kaj historia sorto.

La lando etendiĝas inter Mediteranea maro kaj Alpoj. Tre rare oni atingus tielan kaj diversan naturon. Vojaĝante de okcidento al oriento, tra insuloj aŭ tra kontinento norden, oni konvinkigis, ke eldiroj pri ĝiaj riĉeco kaj beleco ne estas troigaj. Kroatio prezentigis per grandaj etnaj, historiaj kaj arkitekturaj diversajoj. La norda parto enhavas la trajtojn de viena arkitekturo, la orientan Slavonion signas vastaj riveroj kaj fekunda Panonia ebenaĵo. Tute diferencas la adriatika bordo kun miloj da insuloj kaj urbetoj laŭ venecia stilo. Pli ofte vojaĝemuloj el Litovio elektas por viziti Dalmation kaj Istrion. Malpli konata, eĉ kaŝita por ni estas




La aŭtorino

naturo kaj kulturheredaĵo en la centra kaj norda Kroatio.

Tie, kie la unuan fojon estis skribita la vorto "hrvtski"

Al Krk, la plej granda insulo ni transiris per surmara ponto kaj per ŝtretaj vojetoj ekvojaĝis sudflanken, je direkto de Baŝka. La insulo famas pro naturbeleco, milda klimato kaj miljara historio.



La insulo Krk

Survoje nin akompanis cedroj, pinoj, fortaj kakttoj, palmoj kaj grandegaj agavoj. Ni veturis preter navigantaj jaktoj sur mildaj deklivoj kaj lazuraj golfetoj. Ĉi-tie prosperas la fiŝista metio, ĉar la maro adriatika estas malavara pri fiŝoj, kraboj kaj aliaj bonajoj. La plej granda urbo en la insulo estas la samnoma Krk. En la hejmeca malnova urbo el la venecia tempo staras la municipo, la trinava katedralo, la baziliko de sankta Kvirino, kaj la ruinaĵoj de la urba murego.

La insulon ni deziris atingi pro la fama Baŝcanska ploĉa (Tabulo de Baŝka) en la preĝejo de Sankta Lucia. Ĝi estas unu el la plej antikvaj kroataj skribmonumentoj, fama pro la unuafoje enskribita vorto "hrvatski" (kroata) kaj pro la plej malnova blazono de Kroatio sur la preĝeja fasado. La dektrilinia glagolice skribita teksto datas el la jaro 1010. La surskribo mencias la teron donacitan de la reĝo Dimitar Zvonimir al benediktaninoj sur tiu ĉi loko. La teksto estas bonstata, verkita per antikva ekumena lingvo kun influo de la ĉakava dialekto. La tabulo estis trovita en 1851 en silenta vilaĝo Jurandvor apud Baŝka. Ekde 1934 la originalo troviĝas en Akademio de Scienco kaj Kulturo (Zagrebo), kaj en la preĝejo de Sankta Lucia – ĝia preciza kopio. Ĝia bildo videblas ankaŭ sur la 100-kunaa monbileto.



La tabulo de Baŝka

La insularo Brijuni

Ekvidi la insularon Brijuni, la pasintan ĵurnalistan laborlokon post 20 jaroj, estis longdaŭra revo de mia amiko. La loko estas tre populara, tiukaŭze ni trafis tien nur post ripeta mendo.

Laŭlonge de la istria bordo ekzistas kelkaj grupoj de malgradaj insuletoj. La plej interesa, kompreneble, estas konsiderata la insularo Brijuni vidalvidale al Pula. Plej ŝatata de turistoj estas la insulo Veliki Brijun, kie situas nacia parko. Tie kreskas 1600-jara olivarbo, la plej malnova en la mondo. Multas nigraj kverkoj, libanaj cedroj, palmoj, bambuoj, eukaliptoj. Ankaŭ la insula faŭno estas interesa. En arbaraj paŝtejoj promenadas alkoj, muflonoj, fazanoj, pavoj. Tie ĉi vivas la plej maljuna elefantino en mondo.



Brijuni

Restis multaj spuroj de romia, bizanca kaj aŭstria periodoj. Nuntempan aspekton la insuloj akiris en la 19-a. jarcento, kiam la aŭstria industriisto Paŭlo Kupelvizier fondis la somerumejon kaj sanatorion. Tamen la insuloj estas famaj pro la rezidejo de Josip Broz Tito. Tie ĉi okazis gravaj kunvenoj kun eksterlandaj prezidantoj, politikistoj, aktoroj.

Mia amiko Vlado multfoje vizitis la insulon. Laŭ lia opinio, la tempo ŝanĝis la insulon. Por li ekmanis la estinta verdeco kaj konstanta akvumado en la parko, li bedaŭris pro malpermesita eniro en la vilaon de la marŝalo. Ni vidis la faman luksan aŭtegon de la prezidento kaj spektis en la muzeo la ekspozicion, "Josip Broz Tito en Brijuni", kie oni montris fotojn pri pluraj jardekoj de lia gvidado de Jugoslavio. Hodiaŭ ĉi tiuj insuloj estas loko por elita turismo.

Trufela urbo Buzet

Buzeton ni atingis post tradicia brua trufela festo dum septembro. La urbo situas en la norda parto de Istrijo, pinte de la alta monto, sur la valo de rivero Mirna.

La lokon ekfamigis fungoj – trufeloj (kroatlingve: tartufi). Havante specifan guston, ili



Buzet

estas ŝatataj de elektemaj manĝantoj en Italio kaj Francio, tamen ne ĉiuj ŝatas ilin en Kroatio. Trufeloj kreskas en la tero, en la arbaroj ĉirkaŭ la urbo ĉe rivero Mirna. Tiun naturan riĉaĵon oni trovas per speciale dresitaj hundoj kaj rikoltas dum frua aŭtuno. La nigrajn oni kolektas vintre kaj somere.

Kroatia Esperantujo 2010 kaj interesaĵoj de Turopolje

Post la milda ŝoko, kiun mi spertis post vidindaĵoj de ŝtona arkitekturo kaj romiaj sorĉaĵoj, tiu regiono ŝajnis iom pli proksima al nia litova pejzaĝo kaj al niaj tradicioj. La kongresa urbo Velika Gorica estas la centro de riĉhistoria regiono Turopolje, sur kies fekundaj valoj de Sava kaj Kupa konserviĝis spuroj de romia kaj postaj civilizoj.

En la kongreso kolektiĝis ĉirkaŭ 60 delegitoj. Ĉeestis kvin gastoj - geartista paro el Suda Koreujo, profesoro Ĉolić de Bosnio kaj Hercogovinio kaj mi, bibliotekistino el Litovio.

Organizis ĝin Kroata Esperanto-Ligo kaj Esperanto-societo en Velika Gorica. La ĉefa temo estis "Eŭropo kaj Esperanto". Prelegis konataj sciencistoj kaj sociagantoj en Kroatio. Sekretario de Eŭropa Esperanto-Unio, Zlatko Tišljar, sian raporton dediĉis al la 60-jariĝo de ekesto de Eŭropa Unio kaj pritraktis la problemon kaj la krizon de ideo pri lingva egalrajteco en Eŭropa Unio. Ekonomikisto Vjekoslav Morankić parolis pri lingvo kiel identeca demando inter eŭropaj nacioj. Pri la neceso de pli proksima amikumado inter zagrebaj kaj aliaj kroataj esperantistoj diskutis d-ro Zlatko Hinšt. La demandon pri eŭropa komunikado kaj kontaktado de blinduloj pritraktis Antun Kovač.

Estis disdonitaj diplomoj por partopreno de infanoj en la konkurso por la plej bona eseo pri la bengala libro *La vivo de Damoruo* kadre de Eŭropa kultura projekto de Kroata Esperanto-Ligo. Por diversflanka aktivado en socia vivo invitis nova prezidantino de KEL Judita Rey Hudiček.

En la kongreseja salono okulfrapis la nigra busto. Ĝi estas la skulptaĵo al talenta verkisto, iama prezidanto de loka Esperanto-klubo René Matoušek. Li pereis en la jaro 1991 kiel militviktimo en Vukovar.

Vespere en la urba parko ni ĝuis koncerton de loka junulara folkloro ensemblo kaj de brejkdancaĵoj. La korea gastino prezentis dancon *Danko al Suno*. La sekvontan tagon la koreanoj ĝisrevidis kaj daŭrigis sian vojaĝon tra la kontinentoj.

Konatiĝon kun la regiono de Turopolje ni komencis en riĉa regiona muzeo. Turopolje - signifas: la kampo de *tur*-oj. Ĝi ricevis la nomon laŭ la formortinta eŭropa bovspecio nomata nacilingve *tur* (*Bos primigenius*). La malnovan bovon oni povas ekvidi sur la urba blazono de Velika Gorica. Ĝi ornamas ankaŭ la blazonon de

litovia urbo Kaunas. En Litovio ekzistas ankaŭ la urbo Tauragė (*tur*-a korno) kaj la monto de *Turo* en Vilnius. Alproksimigas nin ankaŭ la rivero Kupa, kies ĝemelino fluas en Nordorienta Litovio. Do, tiu ĉi regiono parencas al nia lando. Aldone ni devus menci la saman tradician respekton al kverko (*kras*). Tie ĉi el kverko ili konstruis siajn domojn kaj aliajn objektojn. Tio estas vera regiono de kverko. Apud la loka muzeo situas trunka restaĵo de iama forta kverka grandegulo. En la muzeo ni vidis ekspoziciojn pri pluaj turopoljaj tradicioj, sed oni montris ankaŭ la famajn kroatajn kravatojn.

La sekvan tagon de la kongreso ni pasigis en la ĉirkaŭaĵo de Velika Gorica. Ĉie nin akompanis la zorgema prezidanto de la loka klubo Stjepan Žarina.



Andautonia

La mezkroata regiono Turopolje famas per la arkeologia vidindaĵo *Andautonia parko* (antikva romia urbo el la II-IV jarcentoj), lignaj belajaĵoj de popola arkitektura heredaĵo - preĝejoj kaj kapeletoj, domoj nomataj *čardaci* kaj bienoj *kurije* kaj ankoraŭ ... unikaj turopoljaj porkoj, kiuj paŝtiĝas en arbaraj herbejoj de natura parko *Lonjsko polje*. Porkujo situas apud prizonejo. Ni eksciis pri ilia kapablo naĝi. Turopoljaj porkoj estas la plej malnova specio de porkoj en Eŭropo.

Ni vizitis privatan uzinon de familio Brgljević. Ili produktas naturajn likvorojn kun kuracherboj, fruktoj kaj beroj. Post gustumado mi elektis *smokvicon* (kun figoj).

En la malgranda vilaĝo Mraclin ni trovis la domon de la unua esperantisto, progresema kamparano de la regiono Josip Galeković (1910-1944). Nuntempeaj hejmmastroj, la posteuloj de Galeković, volonte montris al ni Esperantlingvajn leterojn, kiujn li skribis al la edzino dum la dua mondmilito. En tenejo ni kun intereso spektis la restintan ŝtonan tabulon, sur kiu li skribis la Esperantajn tekstojn (Esperanta tabulo de Baŝka). Aliajn tabulojn oni detruis dum domrekonstruado.

Andautonia estas alloga arkeologia parko

en la vilaĝeto Ŝčitarjevo. Oni invitis nin promeni sur pavimitaj stratoj el romia tempo kaj ekscii pri marmoraj tabuloj kun antikvaj enskriboj, pri ceramikaj kaj vitraj faraĵoj, arĝentaj kaj bronzaĵoj, oraj moneroj de imperestro Trajano, kandelingo kun bildo de Jupitero, ekkoni pri la hipokaŭsta sistemo por hejtado, termobanejo, tombejo. Surloke inĝenie agas la societo "Andautonia", kiu donacis al gastoj bonhumoran historian teatraĵon (reĝisoritan de samideanino Romana Rožič).

La vilaĝo Velika Mlaka gardas la antikvan perlon de ligna arkitekturo, la kapleton de sankta Barbara, ĉarpentitan de fortaj kverkaj traboj en la 17-a jarcento, poste ornamitan per barokaj freskoj de talentaj popolaj majstroj. Ĝi lasas neniun dubema pri la beleco – tio estas vere lignaj mirindaĵoj. Impresas ankoraŭ tio, ke estas dekorita ĉiu anguleto de la konstruaĵo pri la vivo de la sanktulino Barbara.

Surprizoj en la regiono de Zagorje

En Zagorje nin atendis novaj surprizoj – neandertalana setlejo sur la monto Hušnjak. Post kelkdeko da kilometroj jen neogotika kastelo Trakoščan, kie ni pasigis alian parton de la tago. Plue, en la urbeto Ivanec ni konatiĝis kun tradukistino Mirjana Bračko kaj pluvojante vizitis la urbon Varaždin, nomatan "eta Vieno".

La norda urbeto Krapina troviĝas je duoncento da kilometroj de Zagrebo, sur la monto Hušnjak. Tie en 1899 la arkeologo-paleontologo Dragutin Gorjanović-Kramberger trovis setlejon de *Homo krapiniensis* - pli ol okcent fosiliaj restaĵoj: homaj ostoj kun armiloj, objektoj por hejmmastrumado. La trovitaĵoj estas interesaj ne nur pro la abundeco, aĝo aŭ kvalito, sed ĉar ili donas spurojn de kanibalismo. La esploroj montris, ke neandertalanoj estis fortaj kaj sanaj. Ili eĉ kapablis kuraci gambojn post amputado. Ili vivis antaŭ 16-20 miloj da jaroj.



Neandertalanoj de Krapina

Surmonite situas parko kun naturgrandaj statuoj de tiamaj homoj kaj bestoj. Ĉi-jare la neandertala muzeo ekfunkciis post rekonstruado. Estis interese spekti la evoluon de vivo paŝon post paŝo en spiralforma ejo kaj rigardi la filmon pri vivmaniero de krapinaj neandertaloj: ĉasadon, hejman ĉirkaŭaĵon, sepultadon.

La tuta teritorio de nordokcidenta Kroatio estas sursemita per mezepokaj kasteloj. Oni diras, ke la plej romantika kaj la plej bela estas la kastelo Trakoščan. La unua ekpenso estis, ke ĝia titolo estas proksima al nia antikva litovia ĉefurbo Trakai. Tamen laŭ sia grandeco kaj riĉa dekorado Trakoščan aspektas kiel naŭ adiciitaj Trakai-oj. La kastelon ornamas vasta pejzaĝa parko kaj lago.

Kaj vere, kion signifas ĝia titolo? Pasinteco la kastelo sur montopinto aspektis kvazaŭ drako. Ĝi havis multajn posedantojn, sed tamen ekde la 16-a jarcento la kastelo iĝis posedaĵo de nobeloj Drašković. Ivan Drašković (1550-1614) tiutempe estis fama militestro.

La kastelo staris sur kruciĝo de gravaj vojoj ĉe ŝtataj landlimoj. Ĝi fariĝis granda fortifikajo dum tempo de turka invado. Hodiaŭ ĝi estas giganta muzeo kun valoraj artaĵoj, mebloj, armiloj kaj aliaj eksponaĵoj. Ili estas ekspoziciitaj en originalaj salonoj, prezentante divesajn artajn epokojn. Multas militistaj eksponaĵoj, kiuj apartenis al mastroj kaj kastela garnizono. Sur muroj pluraj familiaj portetoj, bareliefoj. Videblas, ke ĉi-tie onu estimis familiajn tradiciojn.

Ambasadorino de litova literaturo

Konatiĝo kun Mirjana Bračko estis ankoraŭ unu grava evento. Jarkomence en la urba biblioteko de Vilnius ni aranĝis kulturalan vesperon kaj ekspozicion pri Kroatio kaj trovis la tradukaĵojn de Mirjana Bračko. Pro tio kiam dum mia gastado en Zagrebo, mi estis petinta telefoni al la konata tradukistino, laŭreata de la premio de Sankta Jeronimo, mia amiko Vlado ekĝojis. Eksonis afabla voĉo kaj invito viziti ŝian hejmurbon – Ivanec. Ĉe la tradukistino ni estis tuj post la kongreso, lunde. Ni renkontiĝis en la centro de malnova urbo, ĉe johanana preĝejo. Mirjana ekdemandis, kiamaniere ni trovis ŝin kaj de kie ni ekscii pri ŝi. Mi respondis, ke mi interesiĝas pri kroataj-litovaj kulturaj rilatoj, librumado, pro kio trovi ŝin, la ambasadorinon de nia literaturo, estis facile. Ni konatiĝis kun la familio de Mirjana. Sinjorino Viktorija, la patrino de la tradukistino, estas senfine gastama virino. Por gastoj ŝi fritis famajn *čevapčići*, kaj aldone preparis duspecajn hejmfaritajn makaroniojn. "Hejmo sen gastoj ne estas ĝusta, ĝi estas senfeliĉa", eldiris la bonanimo de la domo. Komenciĝis regalado per vino kaj *rakija* (brando), produktitaj de s-ro Ĉedomir, la edzo de Mirjana, en vinberejoj de Zagorje.

Mirjana varme rememoris pri Litovio,



Mirjana Bračko

kie ŝi vivadis kelkajn jarojn, instruis en Vilnusia universitato kaj mem studis la litovan lingvon. Ŝi sentis zorgemon de kolegoj. Ĉiun semajnfino laŭvice ŝiaj samfakuloj penis okupi ŝin per io, invitante al hejmo aŭ teatro. Sammaniere akceptis ŝin ukrainanoj. Alian atmosferon ŝi trafis en Liono en Francio, kie neniu okupiĝis pri ŝia dekomenca restado en malkonata urbo. Do, per tio ni diferencas de okcidentanoj – ni konservis bonajn amikumajn tradiciojn.

S-ro Ĉedomir ekparolis pri la ideo establi komunikadon de Ivanec kun aliaj samnomaj urboj en la mondo. Mi ekmemoris litovian urbojn Joniškis, Jonava kaj alportis ĉi tiun novaĵon al miaj samlandanoj.

Post regalo venis tempo por subtegmentejo, kie troviĝas la laborĉambro de Mirjana. Komenciĝis konatiĝo kun litovaj tradukaĵoj. Mi tre deziris ekvidi *Via Baltica*, la antologion nomitan laŭ unu novelo de J. Kunčina. Ĝi enhavas rakontojn de plej famaj litovaj prozistoj. Antaŭnelonge mi tralegis la romanon *Balandžio plastėjime (U lepetu goluba)* de Vytautas Bubnys. Mi ekĝojis ekvidinte ĝin tie ĉi eldonitan kroatlingve. La plej interesa kaj komplika por traduki estis la rakonto *Jaučio aukojimas (Zrtvovanje bika)* de Romualdas Granauskas.

Mirjana ankaŭ tradukas litovan poezion, interesiĝas pri baltaj lingvoj kaj mitologio. Ni trafolumis ŝiajn publikajojn en periodaĵoj *Forum*, *Poezija*, *Nova Istra*, *Quorum* k.a.

Mirjana Bračko tradukas ankaŭ ukrainajn, rusajn kaj francan tekstojn. Nuntempe ŝi okupiĝas pri tradukoj el la rusa kaj franca lingvoj. La tradukistino rakontis pri novaj interpretadoj. Sincera amikeco ligas ŝin kun litova pentristo kaj verkisto Keŝtutis Kasparavičius. Antaŭ du jaroj por kroataj legantoj estis prezentitaj liaj *Kvailos istorijos (Budalaste priĉe)*. Ĉi novembron lian novan libron *Trumpos istorijos (Kratke priĉe)* oni lanĉis dum la foiro "Interliber" en Zagrebo, poste - en Karlovac, Split.

En la urbo, kiun protektas brava koko

Sub la flugilo de brava birdo koko vivas durdevac-anoj. Legendo rakontas pri turko Ulama-bejo, kiu malsukcesis konkeri la urbon. Laŭ propono de unu maljulino la defendantoj metis la lastan kokon (*picok* estas koko) en la kanontubon kaj elpafis ĝin al la turka tendaro. Surpriziĝis Ulama-bejo kaj pensante, ke la defendantoj estas sataj kaj primokas lin kaj lian soldataron, li forlasis la urbon nekonkeritan. Dum ĉiujara festo ĉirkaŭ la fortikaĵo reviviĝas scenoj el turkaj bataloj kun multaj piroteknikaĵoj.



Pentraĵgalerio de Ĵurĉevac

Kun bonhumora sento prezentis la urbon Ĵurĉevac la homoj tie renkontitaj. Mi komprenis, ke nur civitanoj tre amantaj sian neston kapablas tiel sinteni. Ni ankaŭ trafis tiun ĉi faman kastelon. Kvankam laborhoroj jam finiĝis, la pordo por gastoj estis gasteme malfermita. Ni ekvidis renovigatajn salonojn en la kastelo. La plej memorinda loko estas la novkonstruita "Galerio de malnova urbo". Ni interparolis pri la konata pentristo Ivan Lacković Croata kaj pri lia multnombra kolekto de plej famaj pentraĵoj donacitaj al la urbo. Estis interese ekvidi kaj ekscii pri la pentrista vilaĝo Hlebine, kiu mondfamiĝis per la verkoj de naiva pentroarto.

La urbo kun 9000 loĝantoj havas modernajn bibliotekojn kaj gimnazon. Nia akompananto samideano Josip ĝojas, ke ilia biblioteko estas en la epicentro de kulturaj eventoj. La direktorino de la Urba biblioteko Anica Šabarić estas homo kun maltrankvila animo. Ŝi estas vera kulturmoviganto kaj iniciatanto pri diversaj projektoj. Ankaŭ la koleginino estas emaj pri novaĵoj. La direktorino volonte rakontas pri reala subteno de landa ministerio kaj loka municipo. Ĉiujare bibliotekas ricevas ĉirkaŭ mil novajn librojn. La municipo ankaŭ pagas por laboro de juna volontulino en la biblioteko.

Riĉa legejo pri landesplorado, laŭ bona gusto ornamita per grafikaj portretoj de kleruloj. Videblas speciala atento al artuloj.

Ni trarigardas vere neprovincajn eldonaĵojn de provinca biblioteko. Kvaliton de eldono povus envii eĉ metropolaj galerioj kaj bibliotekoj. Ni ricevis donace de la durdevaca biblioteko iliajn eldonitaĵojn *Ĝurdevaĉki pijesi* de Radovan Kranjčev pri la fenomeno de "kroata Saharo", *Zavičajno blago* kaj *Ĝurdevaĉki kaj* de etnografo Slavko Čamba, diverskolorajn katalogojn de ekspozicioj. Ili troviĝos inter la unuaj kroataj libroj, alvenintaj al Ŝiauliai. Nia biblioteko jam havas (eble unusolajn en nia lando) du grandajn vortarojn de Lucija Borčić. Tio estas donaco de nia amiko Vlado Jurković.

Dum adiaŭo sinjorino Anica Šabarić ridetante promesis esti la unua studentino en estontaj aŭtunaj kursoj de lingvo Esperanto okazantaj en "ŝia" biblioteko.



Vizite al Urba biblioteko de Durdevac

Do, mi ekvidis ankoraŭ unu specialaĵon de la urbo - ageman societeton de esperantistoj. Ĉiaj laboroj en la urbo estas sentebraj kaj konataj (rimarkeblaj). Tie ĉi ekzistas Esperanto-eldonejo kaj moderna arkivo, nomata Dokumenta Esperanto-Centro. La internacian lingvon oni instruas en la urba gimnazio.

Ni estis invititaj renkontiĝi kun gelearnantoj en la gimnazio *D-ro Ivan Kranjčev*. Esperanton instruas profesoro kroatisto Zdravko Seleš. Dum nia gastado la gimnazianoj la unuan fojon aŭskultis eksterlandaninon komuniki per Esperanto. Kun junaj geamikoj ni parolis pri nekonata baltia lando Litovio, pri la urbo Ŝiauliai. Krome estis prezentita nia litova lingvo.

Forlasinte la gimnazion mi pripensadis, kiom multe dependas urba imago de bonvola kaj insista (obstina) agado de konkretaj personoj. Tia homo estas ankaŭ Josip Pleadin, nomata de proksimuloj Joža. Li estas konata ĵurnalisto, redaktoro de *Zagreba esperantisto*, eldonisto. Nia konatiĝo ekis antaŭ du jaroj. Kun grupo de kroataj ĵurnalistoj li partoprenis Tutmondan ĵurnalistan Esperanto-kongreson en Vilnius. Ni aŭskultis lian prelegon pri eldonado en kunteksto de novaj



Renkontiĝo kun la Esperanto-grupo en Gimnaziod e Durdevac

teknologioj. La komunikado daŭris en Kroatio. Lian klerrecon, atentemon por beletra vorto mi sentis en la literatura renkontiĝo en Hraščina, en la bieno Njeguš, prizorgita de talenta verkistino Spomenka Štimec. En vespera nebulo estis lanĉita nova tragedio de Jean Anouilh *Antigono* en Esperanto.

Tiutempe la eldonistoj parolis pri rilatoj kun la tradukisto Roger Imbert, kiu estis bona amiko de kroatoj, granda fakulo pri beletro.

Josip estas homo de kulturo, homo de libroj en sia profundo. En li kunvenas scioj de enciklopediisto kaj sekreto de verkisto. Ĉi-jare dum julio plenumiĝis lia revo - estis fondita nova civitana societo - Dokumenta Esperanto-Centro (DEC). Diversaj dokumentoj kaj eldonaĵoj estis akumulataj, kolektataj dum tri jardekoj. Oni ricevis multajn donacojn de eldonejoj, de konatuloj, multajn aĉetadajn mem.

Ni trafas en lian eldonejon kaj arkivejon. Montrante raraĵojn, kompletojn de malnovaj periodaĵoj, Josip ĝojas, ke li sukcesis savi ne unu kolekton da libroj, poste ordigi, priskribi, surbendigi ilin. Por serĉi ilin li veturadis en la plej malproksimajn anguletojn de la lando. Por lia persono vere decas nomoj de libro-zeloto, donkihoto. Ni, litovoj, aldonu - la inteligento, simila al nia profesoro Vaclavas Biržiška.

Ni aŭskultis lian paroladon pri konsekvenca kaj obstina laboroj kaj admiris. Paŝo post paŝo estas arkivataj eldonaĵoj de la Esperantomovado el la tuta mondo. Josip elektis originalan manieron por bibliografado. Ne por ĉiu estas donacita talanto de bibliografo. Ordo kiel en preĝejo - tiu frazo tre taŭgas por pritrakti tiun ĉi kolekton.

Esperantisto aldonas, ke la zagreba Esperanto-arkivo dume kuŝas en humidaj ejoj, eldonaĵoj estas netuŝataj kaj senordaj. Tiun laboron li pretus plenumi. Por mi kiel bobliotekistino estis agrable aŭdi, ke ekzistas deziro komuniki, interŝanĝi spertojn, ke oni petas opinion kaj rekomendon.

Ĝis noktmezo ni vesperumis en la hejmeca medio de la arkivo. Dum tiu mallonga tempo mi trovis kelkajn interesaĵojn por Litovio (kompletojn

de la revuo *Litova stelo* 1924, 1925). Inter ili, ankaŭ en *Heroldo de Esperanto* mi tralegis du nekonatajn artikolojn pri nia urbo Ŝiauliai. Tiun novaĵon mi kunportis hejmen.

Ĉiu alveninta trovos interesaĵojn, ĉar la durdevaca Esperanto-arkivo estas la plej granda kaj ja plej moderna en Kroatio.

Gastama domo de familio Pleadin fariĝis hejmeca ejo por esperantistoj. Ĉi-tie kolektiĝas samideanoj el multaj landoj. Ĉi-jara la kongreso okazis en Turopolje, por la sekvonta prepariĝas la urbo Bjelovar. Multajn okupojn havos ankaŭ durdevacanoj, ĉar ili estas la plej proksimaj najbaroj de tiu urbo.

Bonan sukceson al vi, gekolegoj. Mi esperas, ke de nuno via bravulo *picok* protektos ankaŭ niajn paŝojn.

En rondo de amikoj

Estis bela ebleco komuniki kun diversprofesiaj homoj kaj nacioj – ekde vendisto en bazaro ĝis konsilanto de ŝtata gvidanto. Mi ŝpertis kiel vesperumas kaj libertempas dum semajnfino zagrebanoj.

Ĉie mi trovis multajn sincerajn geamikojn. Mi dezirus rakonti nur pli kelkajn.

Kroatoj estas vigla kaj kantema popolo. Mi spektis la regionajn kantvesperojn de Slavonio kaj Zagorje en la televido. Ili estas vere altkvalitaj. Folkloraj tradicioj estas gardataj.

La familio Jurković ankaŭ kantemas. Kun respekto Vlado rakontas, ke lia patro Juraj estis gvidanto de vilaĝfestoj, oratoro kaj kantisto. Liajn ecojn heredis la nepoj. Neven kaj Silvija kreskigas tri infanojn. La plej aĝa Tin vizitas gimnazion pri informadiko. Li, samkiel liaj gepatroj, alvenis tiun saman folkloran ensemblon, kie dum juneco konatiĝis liaj gepatroj. Ne antaŭlonge Tin revenis de folkloro festivalo en Portugalio – tie partoprenis ankaŭ litovoj. Gajaj kaj sinceraj ĝemeloj Nika kaj Fran ludis en balancilo en la korto kaj regalas min per piroj. Mi komencis alparoli ilin kroatlingve. Ja septembro estis komenco de lernoĵaro por ĉiuj, ankaŭ por mi. Sukceson al vi, infanoj.

Mi profunde memoras komunikado kun samideanoj esperantistoj. Ravis ilia intelekto, prudento. Impresis verkistoj Spomenka Ŝtimec, Josip Pleadin, aktorino Vida Jerman, dr. Zlatko Hinšt, bibliotekistino Durda Ŝtokić.

Neforgesebla estis amikumado kun zagrebaj proksimuloj Željko Lipak, familioj de Diana kaj Tomislav Jakić kaj Josip Jeleković.

Dum novembro aperis du novaj libroj – *Koncizaj historioj* de litova aŭtoro Keŝtutis Kasperavičius, kaj memuarajoj *Nisam zavijao s vukovima* de politika ĵurnalisto Tomislav Jakić.

Maltrankvile atendis s-ro Tomislav lanĉon de la libro, kie pluras realaĵoj, multe da politikaj personoj. "Por multaj mi restos maloportuna", li

diras. Tomislav Jakić posedas facilan plumon. Interese pensanta persono. En lia hejmo mi ekvidis brilan bibliotekon. Sur muro pendigitaj malnovaj bildoj kun ekslibriso de lia avo, fama bibliofilo. La patro de s-ro Tomislav multajn jarojn gvidis la bibliotekon de Scienca Akademio. Ni trovis komunan intereson, kiun tuj eksentas libremuloj. Mi foliumis la verkojn de Miroslav Krleža. Speciale poratentis la *Bankedon en Blitva*, kiu rilatas al nia antaŭmilita (kaj ne nur) Litovio.

Multajn jarojn Vlado amikas kun la familio Jakić. Ambaŭ ili estas ĵurnalistoj, fakuloj pri politiko. Por Vlado ĉiam gravas opinio kaj socia agado de amiko. "La unusola temo, kiu min interesas nun, estas politiko", ŝerce diras Vlado, la multjara raportisto, laborinta en la jugoslavia radio. Mi aldonus – ankaŭ vetero ...

Multaj kroatoj aŭskultas veterprognozojn.

Grave pro trafiko sur montaraj vojoj, pro agraj laboroj, pro turismo. Tio estas ĉiutaga ritualo. Ankaŭ mi konatiĝis kun ventoj de *Jadranska magistrala*. Lastjare fajfis *bura*, ĉi-foje ekis *jugo* plena de akcidentoj. Ĝi ekflustris sur mara akvo kiel miloj da fiŝvostetoj kaj alportis varmon kaj humidon. Forirante, ĝi lasis abundajn pluvegojn en la okcidenta Slovenio kaj Kroatio, en la samaj lokoj, kiujn ni preterpasis antaŭ du semajnoj. Lastan dimanĉon ni spektis la inundantan riveron Sava flanke de la parko Bundek en Zagrebo. Bruanta rivero portis branĉojn de arboj, tamen je nia feliĉo ĝi ne verŝiĝis trans la bordoj.

Mi tre ŝatas la zagreban Bundek, novan, spacan parkon dekoritan per maturaj, blanktrunkaj betuloj. Ĉi-jare pluvo forpulis vizitantojn de la septembra foiro "Rujanfest". Restis nur unuopaj paciencaj vendistoj. La lastan dimanĉon ni aĉetis oleon de rosmareno kaj levando por hejmen portotaj donacetoj.

La trian fojon mi vizitis Kroation. *Hvala lijepa* – multfoje mi eldiris tiujn vortojn por sinceraj homoj de Kroatio. La akirita sperto dum vojaĝo kaj novaj kontaktoj estos utilaj por plua profesia kaj socia agado.



En la societo de Jurković-oj

TURISMA ASOCIO DE ZAGREBO FAVORAS ESPERANTON



La direktorino de Turisma Asocio de Zagrebo, s-ino Amelia Tomašević kun siaj kunlaborantoj (2007)

ZE: Ĉi-somere Turisma Asocio de Urbo Zagrebo komencis plurajn aktivecojn dediĉitajn al potencialaj turistoj esperantistoj vizitantaj Zagrebon. Je kies iniciato komenciĝis la kunlaboro kaj kiuj estas ĝiaj longperiodaj celoj?

S-ino Tomašević: La iniciato por ĉi tiu kunlaboro komenciĝis per la renkontiĝo inter reprezentantoj de Turisma Asocio de Zagrebo kaj de Kroata Esperanto-Ligo, kiam montriĝis la neceso de pli bona kunlaboro kaj interligiĝo por riĉigi kaj vastigi la turisman oferton, aparte en la sfero koncernanta reklambroŝurojn kaj retpaĝaron. Nia deziro estis proksimiĝi al la Esperanta populacio kaj tiamaniere Zagrebon fari ankoraŭ pli alirebla al laŭeble granda nombro da potencialaj vizitantoj.

ZE: Esperantistoj estas populacio aparte multe vojaĝanta. La unua paŝo en la kunlaboro de Turisma Asocio kaj Kroata Esperanto-Ligo estis proksimiĝi al tiu populacio. Ĉu vi povas diri al ni, kio ĝis nun estas farita kaj kion oni planas fari en estonteco?

S-ino Tomašević: Ni tradukis broŝurojn kaj nian retpaĝaron al Esperanto, kaj subtenis ĉi-jare en Kubo la prezentiĝon de esperantistoj el Kroatio. Ni ankaŭ donis nian subtenon al la projekto de Zagreba metodo de lernado de Esperanto, kiu devus realiĝi en sekva periodo.

ZE: Kiom kontenta vi estas pri la ĝisnuna evoluo de la kunlaboro? Estante profesia turisma laboranto, kion vi proponas, por ke esperantistoj elektu

Zagrebon por celo de siaj vojaĝoj kaj je kiu maniero Turisma Asocio kaj Kroata Esperanto-Ligo kune povas hepi al ili, por kiom eble pli longe resti en Zagrebo, kaj pli ofte vizitadi ĝin.

S-ino Tomašević: Impresojn de multaj eksterlandanoj kiuj en Zagrebo vivas, de negocistoj kaj turistoj, ni povas resumi en unu frazo: urbo kun miliono da loĝantoj, kiu sukcesis resti romantika kaj sekura. Nelimigitaj estas la eblecoj viziti muzikajn kaj teatrajn prezentaĵojn, pentristajn aranĝojn kaj muzeojn kaj ĝui agrablajn promenojn, interesan arkitekturon, multajn parkojn en la urbocentro, promenzonojn kaj la urban atmosferon. Al la gastamo de Zagrebo la ĉarmon donas ankaŭ la larĝaj promenzonoj kun multnombraj surstrataj kafejoj, kun ĝardenaj kaj strataj teracoj dissemataj tra la tuta urbo. Plejmulto el la kulturaj kaj aliaj institucioj troviĝas en la centro de Zagrebo sur relative malvasta areo atingebla piedirante. Dank' al sia atrakciemo kaj trafika atingebleco, Zagrebo estas ideala urbopaŭza vojaĝcelo, kiu en ĉiu jarsezono ofertas interesajn kulturajn, amuzigajn, distrajn kaj multajn aliajn enhavojn, kiujn la gastoj de la urbo "kompletigas" per gastronomiaj travivaĵoj kaj butikumado. Tiusence oni devas daŭre evoluigi la ĝisnunan kunlaboron, kiun mi taksas tre pozitiva.


ZE: Ĉu vi opinias, ke Esperanto estas utila por uzado en turismo kaj kiel vi taksas, enkadre de viaj konoj, la ĝeneralan staton de Esperanto en Kroatio?

S-ino Tomašević: Kompreneble, ke mi opinias Esperanton utila, kaj pro tio ni ja decidis

traduki niajn retpaĝojn al Esperanto kaj eldoni la broŝurojn. Ni kredas, ke per tio ĉi ni helpis levi la konscion pri Esperanto en Kroatio, kaj espereble la ĝeneralan staton de Esperanto ni eĉ pli progresigis.

ZE: *Universala Esperanto-Asocio en 2001 en Zagrebo okazigis sian 86-an kongreson. Ĉu Zagrebo pretas organizi tiajn kaj simildajn aranĝojn en nia medio ankaŭ estonte, kaj ĉu ekzistas forto por tion realigi en la jaroj konsideratj krizaj. Kiel Turisma Asocio povus partopreni en tio?*

S-ino Tomaŝević: Ĉiukaze jes! Ĝuste dum krizaj jaroj oni devas streĉi kompletajn fortojn kaj fari ĉion eblan por fieri en estonteco. Zagrebon, ĝiajn hotelojn, kongreshalojn, kulturajn instituciojn kaj ekskluzivajn ejojn la negocistoj kaj kongresorganizantoj rekonos kiel tre bonajn gastigantojn, pretaj profesie respondi al ĉiu negoca defio. Luksaj hoteloj inkluzivitaj en prestiĝajn internaciajn hotelĉenojn, samkiel tiuj kiuj sian reputacion konstruis sur la hejma tradicio de gastamo, granda sperto kaj kompetenteco en preparado de kongresoj kaj simildajn aranĝoj, kaj la denaska gastamo de zagrebanoj, estas sufiĉa garantio, ke Zagrebo estas atrakcia kongrescelo.



Enkadre de Turisma Asocio de urbo Zagrebo, jam plurajn jarojn funkcias ankaŭ senprofitcela Kongresa oficejo de urbo Zagrebo, kie oni povas ricevi detalajn informojn pri kongresa oferto de Zagrebo.

ZE: *Kion, el la zagrebaj vidindaĵoj, vi menciis kiel neeviteblajn lokojn por esperantistoj, kiuj ŝatas vidi ankaŭ tion, kion oni ne ofertas en kutimaj turismaj aranĝoj?*

S-ino Tomaŝević: Zagrebo havas riĉan oferton, kaj en ĝi ĉiu povas trovi ion por sia gusto. Mi akcentus nenion aparte, ĉar tiel mi damaĝus la esencon de vojaĝado, la trovadon ne nekonataj lokoj. Zagrebo posedas multajn ĉarmajn sekretojn, kiuj atendas ke esperantistoj malkovru ilin. La sola afero kiun mi volus akcenti estas, ke Zagrebo havas ankaŭ la straton kiu portas la nomon de iniciatinto de Esperanto, sinjoro Ludoviko Lazaro Zamenhof.

ZE: *En Zagrebo en 2009 estis fondita turisma agentejo "Esperanto". Ĉu vi vidas pli signifan rolon de tiu agentejo en venigo de turistoj-esperantistoj al Zagrebo?*

S-ino Tomaŝević: Ĉar ĝi estas la sola tiutipa turisma agentejo, ni laŭdas la iniciaton kaj kredas pri ĝia sukceso. Ni opinias, ke ĝi estas la ĝusta direkto en kiu turismo devas evolui, respektive ke ĝuste per specialiĝo en la oferto ankoraŭ pli ni proksimiĝu al potencialaj vizitantoj kaj al iliaj specifaj deziroj.

<http://www.zagreb-touristinfo.hr/?l=spe>



URSOJ "KUNVENIS" EN HELSINKO

Pli ol 142 urso-statuoj staris en ekspozicio sur granda placo en la ĉefurbo de Finnlando aŭtune 2010, inter ili ankaŭ la kroata. La kroatan urson (dekstre) ornamas "fenestroj", malantaŭ kiuj naĝas orfiŝoj. Vidante la orfiŝojn, ni rajtas deziiri ion. Laŭ la kroata legendo, la deziro realiĝos. La kroatan statuan faris Lovro Artuković (1959), la fama zagreba artisto.

 **Raita Pyhälä**



RAKONTO PRI FRAN KOLAR

Dimitrije Janičić

Niaj antaŭuloj prave diradis, ke la vojo al estonteco gvidas tra la konado de pasinteco. Tia ekpenso instigas nin atente pripensi: ĉu ni vere konas nian pasintecon? Pasas jaroj kaj kelkaj detaloj el la pasinteco similas fabelon. Sed ĝi ne estis fabelo; temis pri revoj kaj streboj de niaj antaŭuloj kiuj amis, kreis, entuziasmis, samkiel ni ĉion ĉi faras, sed en iaj aliaj kondiĉoj. Sekvante la pasintecon ni ekscias pri iliaj provoj fari nian estontecon pli bela, pli riĉa kaj pli enhavoplena. Tiam ni demandas nin: ĉu ni daŭrigis tie, kie ili haltis, aŭ ni opinias ke la vivo komenciĝas per ni mem. Tuj post kiam ni enprofundiĝas en la pasintecon, ĝi montras al ni sian riĉaĵon, instigas nin daŭrigi tie, kie haltis iu el niaj avoj, praavoj aŭ eĉ pra-praavoj.

Tian demandon, al ni, kiuj provas daŭrigi la Zamenhofan ideon pri plibonigo de la mondo, eĉ pli ofte oni devas ripetadi. La plej bona



**Mirjana Hnilička,
la nepino de Fran Kolar**

ekzemplo estas la rakonto pri **Fran Kolar**, esperantisto el la fino de la 19-a kaj komenco de la 20-a jarcentoj. La tempo multon forviŝas, aparte la tempo pezigita per konfliktoj kiuj influis, ke la forgeso nemeritite kovris homojn kaj eventojn. Dank' al la esplorado de s-ro Josip Pleadin, kiu vagas tra labirintoj de pasinteco, provante el pecetoj de la historio de Esperanto-movado en niaj regionoj kompletigi veran rakonton pri ĝenerale homa ideo de tiu pola kuracisto kaj humanisto, akceptita ĉe ni ekde la plej frua tempo, el la mallumo de la pasinteco elponĝis la rakonto pri Fran Kolar Krom, la homo kiu en la foraj unua kaj dua jardekoj de la pasinta jarcento scipovis Esperanton, kolektis homojn ĉirkaŭ tiu ideo, tradukis kaj eldonadis librojn en la Internacia lingvo. Kaj, je nia propra bedaŭro kaj honto, li restis preskaŭ forgesita kaj perdiĝinta en la mallumo de pasinteco.



Fran Kolar dum la junaĝo

El la familio de Fran Kolar, forpasinta en aŭgusto 1927 en Zemun, kaj entombigita en la Zemuna tombejo, hodiaŭ vivas nur lia nepino, **Mirjana Hnilička**, pensiita farmaciisto. Ŝi vivas en Nova Beogrado en la strato *Pariske komune*. Post la telefona interparolo, ŝi afable akceptis renkontiĝi kun mi en sia hejmo por interparoli pri ŝia avo.

Dum vintraj tagoj, Nova Beogrado, la moderna metropolo kun larĝaj bulvaroj kaj multaj herbkovritaj areoj ĉirkaŭ pluretaĝaj domoj, aspektas malvarma kaj fremdiĝinta. Surstrate pasas nur aŭtomobiloj. La promenejoj estas preskaŭ senhomaj, kun escepto de kelklokaj promenigantoj de dorlotbestoj, dum ĉe la bushaltejoj frostiĝintaj kaj malbonhumoraj vojaĝantoj atendas transporton al celoj nur por ili konataj. Telefono ni interkonsentis pri la renkontiĝo. Ĉe la bushaltejo atendis min alta, svelta blondulino de nedefinebla aĝo, kun malferma vizaĝo kaj okuloj ĉiam ridetantaj. Moderne kaj leĝere vestita, sen okulfrapaj detaloj, sed kun gustosento, ŝi aspektis kiel negocistino, sed sen la kutima rigideco kaj streĉiteco en la movoj kiuj akompanas la nuntempajn modernajn virinojn en grizaj vestoj kun neevitebla tekokomputilo kaj mansaketo konforma al ilia okupo.

Post mallonga interkonatiĝo, ni ekiris al ŝia loĝdomo. Moderna loĝejo en la novbeograda pluretaĝa domo kun interfono kaj lifto. Sed post kiam vi eniris, alfrontas vin jam malpli ofte videbla mondo: grandaj artpentraĵoj, speguloj kun ornamitaj kadroj, silentaj anguloj kun manlaboraĵoj, atmosfero de malnova burĝa familio en

kiu ankoraŭ vivas iu forgesita pasinto, kompreneble, kune kun la detaloj de modernstila kuirejo, komputilo kaj moderna televidilo. Kaj ĉio ĉi ordigita per atentema virina mano.

Ĉe tradicia kafo ni komencas nian interparoladon, kiu devus proksimiĝi al ni la avon de Mirjana. Sed, antaŭ tio, jen kelkaj vortoj pri ŝi mem!

- Mi naskiĝis en Zagrebo, en januaro 1941. La infanaĝon mi preskŭ ne memoras. Oni diris al mi, ke mia patro estis favoranto de jugoslavismo kaj panslavismo. En tia situacio, estis rekomendinde rifuĝi el la tiam Zagrebo, kaj ni revenis laŭ la vojo de mia avo al Zemun. Tiel mi plenkreskiĝis en Zemun, respektive en Beogrado, kie mi finis Farmacian fakultaton. Mi vivis kun la patrino kaj mia frato, kiu, je mia granda bedaŭro, treege malsaniĝis. Li bezonis bonan flegadon - kaj mi dediĉis min al tio. Mi ne bedaŭras, ĉar mi plilongiĝis lian vivon je kelkaj jaroj, sed nun mi jen restis sola. Mia frato Siniša mortis en 2004, kaj mia patrino en 2007. Nun mi kunloĝas kun miaj rememoroj kaj miaj libroj. Pasintjare aperis mia mallonga romano kun moderna temo, kiu troviĝis eĉ en la listo de verkoj proponitaj por Premio de urbo Beogrado. Fojfoje oni demandas min pri civitaneco kaj nacia aparteno. Naskiĝinta en Zagrebo de la gepatroj el du nacioj, estante laŭ la patro ĉeĥino, la tutan vivon mi pasigis en Serbio. En tia vivo ne ekzistas aparteno al iu nacio: mi estas mondcivitano, samkiel estis mia avo Fran, ĉu ne?

- Pri la avo vi scias nur laŭ la rakontado de via patrino?

- Jes. La avo por mi estas nur bela, malnova rakonto. Rakonto konsistanta el pecetoj, ĉar la patrino nur de tempo

al tempo rakontis detalojn pri sia patro. Tiel mi eksciis pri lia alta staturo, pri tio ke li estis societema, ke la domo ĉiam estis plena de liaj amikoj, (tia estis ankaŭ mia frato, ĉiam oni parolis ke la societemon li heredis de sia avo), plej ofte esperantistoj. Kiel infano mi revis pri la avo videbla sur la artpentraĵo ankoraŭ pendanta sur la muro en mia loĝejo, pri la avo kiu neniam permesis ke lia edzino laboru, kvankam ŝi estis edukita, pri la avo en oficiala uniformo kaj kun sabro, kiu ankaŭ konserviĝis ĝis la nuna tempo. Pri la avo kiu ludis nekutiman muzikinstrumenton - citron, pri kiu malmulton scias simplaj



La oficiala sabro de Fran Kolar



Citro - la ŝatata instrumento de Fran

homoj, kun escepto de muzikistoj. Ĝi eĉ hodiaŭ estas originala, tia kia restis post la avo. Iam, kiam mi viŝas ĝian polvon, mi movas fingrojn laŭ la kordoj, kaj tiam kvazaŭ mi aŭdas harmonion kiun li tiris el tiu ĉi nekutima instrumento.

- Kial la avo ne revenis al sia naskiĝregiono? Kion li heredis de la patro?

- Verŝajne la praavo tiel decidis. Unu el la filoj heredis la bienon, la alia edukiĝis. Tio signifis, ke sian parton de la patra heredaĵo, mia avo elspzis por edukado. Niaj antaŭuloj, evidente, estis tre raciaj kaj praktikaj. La gevaŭj geedziĝis

en Triesto, vivis en Zagrebo, Bjelovar kaj Zemun ... Kaj ĉio estis en ordo.

- Kaj la avino?

- La avino estis edukita, sed la avo opiniis, ke virino estas kolono de la socio, kaj ŝi neniam laboris. Mi memoras du versiojn pri tio kiel la geavoj konatiĝis. La unua estis, laŭ la patrino eldiro, oficiala. La avino kaj la avo estis kun siaj societoj en Venecio. Sur Placo de Sankta Marko ambaŭ grupoj de ekskursantoj renkontiĝis. Post la unua interparolo Fran kaj Slava ekplaĉis unu al la alia, baldaŭ Fran enskribiĝis en la memorlibreton de Slava kaj ili

geedziĝis en Triesto, kie cetere ili tiam vivis.

Laŭ la neoficiala versio, Slava plendis al sia amikino, ke ankoraŭ neniu svatis ŝin, kvankam ŝi estis preskaŭ 17-jara. La amikino klarigis al ŝi, ke fraŭlino kiu deziras edziniĝi, ne rajtas havi kakton en sia domo. Sidinte kune kun la amikino apud la fenestro kie troviĝis kaktos en la potoj, Slava kolere puŝis la poton, kiu renversiĝis kaj falis tra la malfermita fenestro sur la kapon de Fran kiu tie preterpasis. Vizitante lin en la hospitalo, Slava, kiu sentis sin kulpa pro lia vundiĝo, enamiĝis al Fran, kaj ili geedziĝis. Mi pli ŝatas la nefocialan version - ridetante diras Mirjana.

La avo estas entombigita en Zemun, kaj la avino en Zagrebo, en la tombejo Mirogoj. La familianoj havis la ideon entombigi ilin kune, sed objektivaj cirkonstancoj kaj manko de mono, ne malpli ankaŭ la burokrataj komplikadoj, malebligis eltombigon de Slava, pro kio ilia ĉi-tera avo restis nekronita per eterna kunestado. La tombon de Fran ni renovigis kiam lia nepo estis entombigita en ĝi.

- Kial la avo portis la kromnomon Krom?

- Mi demandis ankaŭ mian patrinon pri tio, sed ŝi ne kapablis klarigi al mi la misteron. Nenie estas notita la deveno de tiu kromnomo. Foje ŝi diris, ke la avo aparte respektis siajn juristan, inspektistan kaj advokatan laborojn. Li deziris apartigi sian hobion disde la salajrata laboro. La patrino, kiu parolis Esperanton, opiniis, ke lia kromnomo estas intence elektita Esperanta vorto, kies signifo nur je unua vido restas nekomprenebla.

- Kiel vi imagis vian avon?


Por mi la avo estis, laŭ la patrino rakontado, neresanigebla romantikulo. Lia amo al la avino, pri kiu restis konservita poemo en la memorlibreto de mia avino, ĉio efikas tre romantike. Tiutempe ĉiuj fraŭlinoj havis memorlibretojn, kaj fraŭloj klopodis en ili lasi la plej belajn notojn. Lia manskribo en la memorlibreto de la avino por mi estas vera mirindaĵo. Hodiaŭ malmultaj posedas belan manskribon, ĉar la komputila teknologio malbonigis ĝin. La avo per ornamitaj, bele formitaj literoj, skribis sentemajn kaj belajn amvortojn, kaj eĉ en akrostiko, kies komencaj literoj donas ŝian nomon. Por mi tio estis mirinda belaĵo. Kaj belega memoro pri amo el pasinteco.

- Ĉu li estis oficiro?

- Jes, li estis, sed la patrino ne rakontis pri tio. Li soldatservis en la tiama aŭstria-hungara armeo. Krom kelkaj fotoj en uniformo, ĝis nun ni konservis ankaŭ lian sabron, sed temas pri lia oficista sabro, ĉar en lia tempo ankaŭ ŝtataj oficistoj portis sabron kiel simbolon de ŝtata povo.

- Ĉu vi scias ion pri lia laboro en la Esperantomovado?

- Ne multe! Mia patrino scipovis Esperanton, sed pri tio ŝi ne rakontis. Iam mi vidis Esperantajn gazetojn, sed dum tempopaso ili malaperis. Kiel sanktaĵon mi konservis nur ekzempleron de lia traduko de la romano de August Ŝenoa "La trezoro de l' orajisto". Tiu ekzemplero estas tole bindita kun orpresitaj literoj. Ĉiam ni opiniis ĝin grava familia memorindaĵo. Ankaŭ hodiaŭ mi pensas tiel, ĉar la libro atingas sian centjarigon. Je mia bedaŭro, mi ne sukcesis trovi informojn kiel ekestis tiu traduko, kaj en la enkonduka



La akrostika poemo de Fran Kolar verkita kroatingve en la memorlibreto de lia posta edzino Slava Godina

teksto mia avo skribis precipe pri la verkoj de Ŝenoa kaj pri ilia graveco por la historio de Kroatio. Nenion li mencias pri la ekesto de la traduko, kun kiu li kunlaboris kaj kiajn problemojn li havis. En la tiutempa Esperanto-gazetaro aperis kortuŝa adiaŭa teksto kiam li mortis, sed ankaŭ tion mi eksciis poste kaj oni devis ĝin traduki por mi. Estas tiaj tempoj, pasis plena jarcento, kaj denove sur la pesilon oni metas la valoron de lia Esperanta laboro, sed pli bone iam ol neniam. Mi povas nur danki kaj gratuli la kroatajn esperantistojn pro tiu ĉi iniciato.

MORTIS VESNA PARUN KROATA POETINO, DRAMISTINO KAJ TRADUKISTINO

 Radenko Milošević

Funebraj mortosciigoj ne venas nur el la esperantista medio, sed ankaŭ el naciaj sciencaj, artistaj kaj verkistaj rondoj. La 25-an de oktobro ĉi-jare en Stubičke Toplice mortis la 89-jara kroata poetino, verkistino kaj tradukistino Vesna Parun. Ŝi apartenis al la plej elstaraj kroataj poetinoj de la dua duono de la 20-a jarcento.

Ŝiaj vivo kaj la sorto similas al sortojn de pluraj kroataj verkistinoj kaj poetinoj. Multaj ŝiaj emocioj kaj profunda amo kaj kompatato estas versigitaj en ŝiaj poemoj. Per amo el la koro kaj el ŝia interno venis al ni aro da poemoj el kiuj radias ŝiaj plej ŝatataj temoj: olivarboj, koraloj, maro. La primaraj elementoj estas enkonstruitaj en la fundamenton de ŝia versfarado ekde ŝia junaĝo. Pro la abundo de ŝiaj temoj, motivoj kaj verkofekundeco, ŝi mem kaj ŝia poemoj estis tiom ŝatataj kaj tiom ofte tradukataj en diversajn fremdajn lingvojn.

Ŝia verkaro, kreata dum pli ol kvindek jaroj (sesdek libroj da poezio, prozaĵoj kaj dramoj) jam antaŭ ŝia forpaso apartenis al la kroata literatura Parnaso. Gravajn kaj multnombrajn premiojn ŝi ricevis por sia laboro. Ŝia poemaro "Aŭroro kaj ventegoj" (Zora i vihori) estis elstara momento en la avancado de tiutempa kroata poezio. Premion de *Matica Hrvatska* por la poemkolekto "Poemoj" (Pjesme) ŝi ricevis en 1948 kaj Premion de Urbo Zagrebo en la jaro 1955 por la poemaro "Nigra olivo" (Crna maslina).

La kroata poetino Vesna Parun naskiĝis sur la insulo Zlarin, proksima al urbo Šibenik la 10-an de aprilo 1922. Pro la malbonaj vivkondiĉoj en



la kvininfana familio, la poetino grandan parton de ŝia junaĝo pasigis en kelkaj apudmaraj urboj kaj insuloj. Dum ŝiaj bazlernejaj kaj gimnaziaj jaroj, por vivteni sin, ŝi jam komencis instrui. Fininta gimnazion en Split en 1940, dum la aŭtuno samjare ŝi komencis studi romanistikon ĉe Filozofia fakultato en Zagrebo. Teruraj militjaroj rezultis translokiĝon de ŝia familio kaj pereon de ŝia frato en la batalo. Krizo sekvis krizon kaj malfaciligis ŝian vivsorton post la milito. Ŝi malsaniĝis je tifo en 1947, edziniĝo kaj ekdeziniĝis en Bulgario (1962-1967) kaj ceteraj malfeliĉoj rezultigis ke ŝi ĉesigis la studadon. Post la reveno el Bulgario ŝi vivis plejparte en Zagrebo, en sia modesta loĝejo en la t.n. Studenta urbo, kiun ŝi forlasis kaj provizore translokiĝis pro resanigaj celoj al Stubičke Toplice. Vivinte, laŭ la propra volo en izoleco, ŝi estis preskaŭ forgesita pro sia decido "ke ŝi ne volis kliniĝi antaŭ iu ajn" kaj pro la socia forgesemo. Pri tiu situacio ŝi skribis, ke "dum lernado multon oni povis lerni pri gramatiko, pri ortografio, historio kaj stelaro surĉiela, sed pri homo kaj vivo – preskaŭ nenion".

Por multaj homoj

estas mencienda la konfeso de la verkistino Vesna Parun pri sia kredo, sciigita en la kroata katolika revuo "Glas koncila" dum Epifanio de 1973: "Ĉio kion homoj dum epokoj serĉas celante trovi kompletan veron pri homo, troviĝas en Li – Jesuo Kristo. Li ne estis elprenita el polvo. Li dum eterneco vivas en la mondo, en homoj, en ideoj, en amo, en kompatato, en ĉio ... Li estis kaj la plej granda pensulo, kaj filozofo, kaj homo, kaj etikisto, kiu en si mem havis ĉion ĉi, kaj eĉ pli ..."

Ŝia malfacila vivo, plena je suferoj kaj malagrablaĵoj, rezultis ke ŝi komplete dediĉis sin al literaturado, fariĝinte tiel la unua virino en la kroata literaturo kiu vivis nur per kaj por literaturo kaj verkado. Ŝia riĉeventa kaj malfacila vivo finiĝis en Stubičke Toplice, kie ŝi dum multaj jaroj restadis.

Ni finu ĉi tiun tekston pri nia elstara kaj neanstataŭigebla heroino kaj poetino per kelkaj vortoj pri ŝia rilato al Esperanto. Inter kroataj esperantistoj ŝi estis tre ŝatata. Atestas tion multaj ŝiaj Esperantigitaj versoj publikigitaj en kroataj Esperanto-gazetoj "Koko", "ZELano", "Tempo" kaj en pluraj libroj. Ŝiaj poemoj troveblas en la antologioj "Kroata poezio" (IKS, Zagrebo, 1983), "Kroataj poetinoj de la 20-a jarcento" (KEL, Zagrebo, 2003) kaj en "Izolulo - Poemoj de kroataj poetoj en dekkvin lingvoj" (Osamljenik - Pjesme hrvatskih pjesnika na petnaest jezika, eldonita de IKS, Zagrebo, 1993). En la katalogo de ekspozicio "Esperanto en la kroata literaturo kaj politika vivo", okaze de la 7-a kongreso de kroataj esperantistoj en Zabok (2005), poemoj de Vesna Parun estas multfoje menciitaj.

CENT DUDEK JAROJ DE LA MALNOVA TRANSPORTILO

 Radenko Milošević

La plej malnova urba transportilo de Zagrebo, kiu transportas la urbanojn kaj turistojn al la Supra urbo situanta sur la monteto "Gradec", estas speciala kablotramo. Je unu jaro ĝi estas pli aĝa ol la ĉevala tramo de Zagrebo. La ideo pri konstruado de tia transportilo aperis kiam oni komencis nombri la oftecon de piedirintoj en diversaj stratoj tra kiuj oni ascendas al kaj descendas el la Supra urbo. Estis rimarkite, ke la plej multo de piedirantoj ascendas al la Supra urbo ĝis la lasta stacio ĉe la promenejo de J.J. Strossmayer, troviĝanta apud la turo Lotrščak. La piedvojo gvidis precize laŭ la ŝtuparo tra la iama Bregovita strato (nun strato de Tomić).

La ĉarma malnova transportilo, kiu kunligas la du zagrebajn partojn, respektive la Supran kaj Malsupran urbojn, havas interesan kaj ĉe la komenco de la uzado eĉ primokindan historion. Oficiale la proklamo de ĝia uzado, sen speciala solenaĵo, okazis la 8-an de oktobro 1890, sed ĝi efektive ekfunkciis kiel transportilo la 23-an de aprilo 1893. Jam dum la konstruado evidentiĝis multaj neatenditaj malfacilaĵoj. Ĉe la unua testveturado de malplenaj vagonoj elŝiriĝis la ĉefa lagro de la maŝino kune kun la fundamento, kaj la tuta maŝino rompiĝis. Bedaŭrinde, post la ekfunkciado da la transportilo, problemoj svarmis dum kelkaj jaroj. La kablotramo estis pli ofte nefunkcia ol ĝi transportis la urbanojn, kaj plurfoje ili devis eliri kaj puŝmovi la vagonon. Tial zagrebanoj donis al ĝi karesnomon "zapinjača" (anstataŭ la kroatlingva nomo de la veturilo "uspinjača"; tradukebla figuresence kiel "haltotramo" anstataŭ "kablotramo")!

Nia titolpaĝa foto montras la atrakciaĵon de Zagrebo, ĝian kablotramon, kiu en 2010 fariĝis respektinda maljunulo: ĝi atingis sian 120-an naskiĝtagon!

Malgraŭ la komencaj "infanaj malsanoj", neniam dum pli ol unu jarcento de ĝia funkciado, okazis akcidento, aŭ estis vundita iu pasaĝero. Pro tio ĝi estas la plej sekura publika transportilo ne nur en Zagrebo. La kablotramo konservis sian originan eksteran aspekton ĝis nun. Ambaŭ ĝiaj haltejoj, vagonoj, teknikaj karakterizaĵoj, partoj de ĝia strukturo kaj kablotrama relvojo restis komplete neŝanĝitaj ekde la tempo kiam ili estis konstruitaj. Nuntempe la zagreba kablotramo estas lege protektita kiel kultura monumento. Komparante la 66 metrojn longan zagreban durelan kablotramon kaj ĝiajn 1,20 metrojn larĝajn trakojn, kun aliaj samspecaj transportiloj en aliaj urboj, la zagreba estas la plej mallonga tia transportilo funkcia en la publika trafiko. En la komenco la zagreba kablotramo estis movata per vapormaŝino, kiun en 1934 anstataŭis la elektra. La kablotramo konsistas el du paralelaj vagonoj kiujn tiras la 22 milimetraj ŝtalŝnuroj, movataj per permuta motoro en la maŝinejo ĉe la supra parto. La unuaj pasaĝeraj vagonetoj estis dividitaj je tri partoj: tiuj turnitaj al la suba strato Ilica kaj al la supra urbo parto Grič, estis la unuaklasaj, kaj meza parto pro la malpli bona videbleco estis la duaklasa. Tiutempe do ekzistis ankaŭ la preza diferenco de vojaĝbiletoj. La kablotramaj reloj estis konstruitaj sur oblikva viadukto kun duoncirklaĵoj 2,5-metraĵoj. Malgraŭ la

konstanta ŝarĝiteco, la malnova konstruaĵo ĝis nun ne montris ian ajn damaĝon. En la duoncirklaĵoj niĉoj nun funkcias artaj galerioj kaj memorajvendejoj.

La malnovaj maŝinoj kun lignaj dentradoj, en tiu ĉi la plej malnova originala kablotramo en la mondo, en la tempo de ĝia ekfunkciado estis vera raraĵo, sed iom post iom ili fariĝis nesufiĉe sekuraj. En 1969 la funkciado estis ĉesigita kaj la malnovan kablotramon oni planis rekonstrui. Tamen, pro la bona stato de sia strukturo, ĝi restis neŝanĝita. Arkitektoj kaj restaŭristoj sukcesis rekonstrui la malnovajn partojn, kaj la rekonstruado estis finita en la jaro 1973.

Ni aldonu ankoraŭ kelkajn teknikajn informojn. Ĉiu vagono havas kapaciton por 28 pasaĝeroj (16 sid- kaj 12 starlokoj). Longeco de la vagonoj estas 5,6 metroj kaj aksdistanco 3,7 metroj. Sen pasaĝeroj ĉiu kabino pezas ĉirkaŭ 5 tunojn kaj ĝi povas porti ankoraŭ 2,2 tunojn da pezo. La nuna elektra motorforto estas ĉ. 28 kW, kaj uzata estas la elektra tensio de 400 V. La plej granda permesita veturrapideco de la kablotramo estas 1,5 m/sek kaj la veturado ĝis la supra daŭras 64 sekundojn. La niveldiferenco estas 30,5 metroj, kaj la supra haltejo estas je la nivelo de 156,5 metroj. La trafikservo de la kablotramo estas averaĝe 4.000 kilometroj jare kaj ĝi transportas proksimume 700.000 pasaĝerojn dum ĉiu jaro.



GRUNDTVIG KAJ ESPERANTO

 Estraro de ILEI-Pollando

Okaze de la 10-jara jubileo de la Grundtvig-Projekto estis aljuĝitaj premioj por la plej sukcesaj kunlaborantoj de la projektoj. La festo okazis la 10-an de decembro 2010 en Varsovio en bela Ĉambrego de la Teknika Domo NOT.

La Grundtvig-Programo estas ĝenerala nefaka edukado de plenkreskuloj. Ĝia nomo devenas de la nomo de Nikolao Grundtvig (1783-1872), dana filozofo, poeto, pedagogo, fondinto de la unua popola universitato kaj la aŭtoro de la koncepto Dumviva Lernado.

La menciita projekto alportis du premiojn por la Esperanto-movado, pri kiuj ni prave povas fieri. Malofte okazas, ke dum grava neesperanta evento du principajn premiojn ricevis esperantistoj. Tio estas granda sukceso, granda ĝojo, granda distingo kaj ankaŭ kontentego kaj fiero.

La sekretario de ILEI kaj ILEI-Pollando, Małgosia Komarnicka ricevis la Unuan Premion en la Konkurso GRUNDTVIG - Programo Dumviva Lernado kiel la plej bona laboranto de la jardeko pro la rakonto Grundtvig kaj Esperanto!

La konkursa komisiono motivigis la premion jene: Ŝia verko estas originala, plena je fervoro kaj entuziasmo, enhavanta multon da personaj pripensoj. Unika estas la formo de la laboraĵo. En ĝi la aŭtorino detale elmontris, kiajn spertojn kaj kapablojn ŝi gajnis kiel Asistanto kaj kiamaniere ili influis ŝiajn vivon kaj profesion laboron. Apartan distingon meritas la konsideroj de la aŭtorino pri la kresko de ŝiaj personaj kompetentoj, kiu ŝuldiĝas al la partopreno en la



**Małgosia Komarnicka,
la plej bona laboranto
de la jardeko,
kun la diplomo
de GRUNDTVIG**

program de la Asistanteco. Ŝi vaste priskribas la utilojn de individuaj eksterlandaj restadoj same por Asistanto, kiel ankaŭ por la propra kaj gastiganta organizaĵoj.

Małgosia loĝis 10 monatojn en Herzberg kaj laboris kiel volontulino en Interkultura Centro Herzberg (ICH). La celo de ŝia restado estis, inter alie, konatigi kun rimedoj por edukado de plenkreskuloj, observi internaciajn edukprogramojn kaj aktivecojn de plenkreskuloj, prilabori lern-kaj instrumaterialojn respektive organizi kaj gvidi kursojn por plenkreskuloj. Ŝi tion ĉi povis sperti dank' al la ASISTANTECO de GRUNDTVIG, projekto

en kadre de la programo de EU *Dumviva Lernado*.

Priskribon de la Asistanteco de Małgosia vi trovos sur la paĝoj de la Nacia Agentejo Grundtvig <http://grundtvig.org.pl/index.php/ida/218/>. Ŝia raporto estas ekzemplo de *Bona Praktiko* kaj estos libroforme eldonita venontjare (tiu priskribo estos montrata al eŭropanoj).

La alia premiito estis **Halina Komar, prezidantino de Pola Esperanto Asocio**. Ŝi gajnis la duan premion pro sia *Letero al amikoj en la kategorio: plej bona organizaĵo*.

La Konkursa Komisiono aljuĝis por la organizaĵo la duan premion, substrekante modernan uzon de la eŭropuniaĵ monrimedoj ĉe la esperantista organizaĵo en Pollando. La komisiono ankaŭ pritaksis tre alte la engaĝigon de Pola Esperanto Asocio por la aktivigo de personoj 55+ en la loka socio. Oni ankaŭ atestis la praktikan valoron de la konkursa laboraĵo - la indikojn kaj konsilojn, kiamaniere plibonigi organizadon de la projekto. Specialan atenton meritas la fakto, ke la organizaĵo promocias la valorojn de la lingvo Esperanto, kiu proksimigas homojn, ebligas facilajn kontaktojn kaj ankaŭ - kion oni prezentis en la projekto - estas la aŭtentika integritulo. En la konkursaĵo oni montris amplekse ankaŭ la profitojn, kiujn donis la programo GRUNDTVIG al la aŭskultantoj de la projekto kaj al la organizaĵo mem kaj ĝiaj aktivuloj.

La estraro de la pola ILEI-sekcio tutkore gratulas al ambaŭ premiitoj kaj deziras al ili pluan sukcesan agadon, profitodnan al la movado.

La oficiala gazeto de TEJO, "TEJO tutmonde", ĉesis aperi en 2010. La informoj, kiuj ĝis tiam aperis en "TEJO tutmonde", estos diskonigataj tra la retejo de TEJO kaj en nova movada rubriko en la revuo "Kontakto". Kiel nova redaktoro de "Kontakto" estis elektita la konata brazila rok-muzikisto Rogener Pavinski, kaj la unua numero sub lia redaktorado jam aperis.

La 18-an de septembro 2010 granda incendio trafis la brazilan bienon "Bona Espero", sed la objektoj restis konservitaj.

Per donacoj de 32.000 eŭroj, unu el la plej popularaj retejoj, *edukado.net*, ricevis sian novan veston. Grandparte financis la komplikajn kaj multekostajn projektojn Esperantic Studies Foundation el Usono.

Aleksandr Korĵenkov kaj Halina Gorecka, la fondintoj de eldonejo Sezonoj, ricevis en 2010 la plej grandan kulturpremion en Esperantujo, la FAME-premion.

La turka reĝisorino Tuĝce Sen (neesperantistino) surprizis la esperantistan mondon per Esperantlingva filmo "Senmovaj".

Nekutime grandan publikan atenton ricevis la simpozio de la Novjorka oficejo de UEA "De Zamenhof al Soros", kiun ĉestis la mondfama miliardulo George Soros. Unu el la programeroj dum la simpozio estis prezento de angla traduko (farita de Humphrey Tonkin) de la verko "Modernaj Robinzonoj", verkita en Esperanto de la patro de George Soros, kaj unue aperinta en la jaro 1923. La angla traduko aperis ĉe Modial en Novjorko. Dum la simpozio montriĝis, ke George Soros mem junaĝe parkeris poemon

de Zamenhof. La simpoziojn partoprenis sepdeko da homoj.

Stefan Maul, konata germana ĵurnalisto, kiu kunfondis kaj dum multaj jaroj ĉefredaktoris la gazeton *Monato*, en 2010 forlasas sian postenon, kaj lian

lokon prenis Paul Gubbins.

Ekde la jarŝanĝo la redaktoro de la revuo de UEA, Stano Marček, havos novan laboron. Li redaktos la revuon de Germana Esperanto-Asocio, *Esperanto Aktuell*.



SOLENAĴO EN BOSNIO KAJ HERCEGOVINO

La urba Esperanto-societo "La Mondo" el Banja Luka (Bosnio kaj Hercegovino) la 18-an decembro solene festis centjarigon de Esperanto en Bosnio kaj Hercegovino en koncertsalono de Artakademio de Respubliko Serba. La unuaj esperantistoj en Bosnio kaj Hercegovino aperis en urbeto Mrkonjić Grad en 1892, nur 5 jarojn post apero de la unua gramatiko de Esperanto (1887). La unua Esperanto-societo estis fondita en Sarajevo en 1910 sub la nomo "La Stelo Bosnia" kaj havis 120 membrojn (80 el Sarajevo kaj 40 el aliaj lokoj).

Banjalukaj esperantistoj solenis ankoraŭ unu gravan jubileon. Ilia prezidanto Mićo Vrhovac festis tridekjariĝon de sia aktivado en la Esperanto-movado. Dum la solenado de tiu jubileo li ricevis argentan plakedon kaj pri lia aktivado parolis konata esperantisto d-ro Ljubiša Preradović.

S-ro Vrhovac estis trifoje prezidanto de Esperanto-societo en Banja Luka, membro de la Estraro de Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino, membro de la LKK de la 22-a kongreso de jugoslavaj esperantistoj, dufoje prezidanto de Esperanto-Ligo de Respubliko Serba, membro de AIS, membro de Balkana komisiono de UEA, Esperanto-instruisto laŭ Cseh-metodo, gvidinto de 30 Esperanto-kursoj, respondeca redaktoro de kelkaj libroj, kaj li laste famiĝis pro la rolo de d-ro Zamenhof en la teatraĵo "Dek tagoj de kapitano Postnikov" ludita en Bjalistoko, Sankt-Peterburgo, Kragujevac kaj Banja Luka.

En la arta parto de la solenaĵo koncertis Svetlana Ĉutić-Štula (violono) kaj Svetlana Pantelić (piano) el Serbio kaj Bojana Obradović (violono) kaj Marija Šestić (piano) el Respubliko Serba (BkH). Ĉirkaŭ 50 ĉeestintoj ĝuis la muzikon de konataj mondaj komponistoj kaj post la koncerto tre vigle babilis dum la koktelo.

Pri la solenaĵo raportis la Televido kaj Radio de Respubliko Serba, Radio "Libera Eŭropo", "Uno Radio" kaj Alternativa televido el Banja Luka.



Renkontiĝo de Esperantlingvaj Familioj (REF) okazis en Stara Sušica inter la 25-a de julio kaj 8-a de aŭgusto 2010 kun partopreno de 59 personoj el 11 landoj.

Vanja Radovanović el Zagrebo, dum novembro ekspoziciis siajn fotojn pri nekonataj aspektoj de Zagrebo en la firmao Ericsson-Tesla, kie li laboras. Pri la sama temo la zagreba revuo "Globus" aperigis en sia numero de la 31-a de decembro 2010 kvarpaĝan artikolon "Nepoznati Zagreb tajanstvenog Vanje R." el la plumo de Darko Hudelist.

SEK Zagrebo ŝanĝis sian estraron, kaj la nova prezidanto fariĝis Đivo Pulitika el Dubrovnik, aktuale studanta en Zagrebo. Li ankaŭ gvidas porkomencantan kurson kaj estas

samtempe prezidanto de Kroata Esperanto-Junulara Asocio.

Judita Rey Hudeček reprezentis Kroatan Esperanto-Ligon en la simpozio "Eŭropa Unio - hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ - lingvaj kaj kulturaj aspektoj" kaj 100-jariĝa festo en Sarajevo (Bosnio kaj Hercegovino) inter la 29-a kaj 31-a de oktobro 2010.

Inter la 31-a de julio kaj 5-a de aŭgusto, organizita de Esperanto-societo Sisak, okazis la 2-a boatado sur la rivero Kupa.

La 65-jariĝon festis Esperanto-societo "Bude Borjan" kaj la 40-jariĝon Kroata unuiĝo de nevidantaj esperantistoj (KUNE) dum la Zamenhofa festo, okazinta en Juda komunumo de Zagrebo la 20-an de decembro

2010.

La ĉi-jara premio "Kalendulo" estis atribuita la 20-an de decembro al la veterana esperantisto Ivo Borovečki, kiu ĉi-jare festas 70-jariĝon de sia poresperanta agado. La Subvencion "Kalendulo" samtage ricevis Unuiĝo de Prelegantoj de Esperanto (UPE), Esperanto-societo Sisak, Tea Radovanović kaj Dokumenta Esperanto-Centro.

Laŭ la Gazetaraj Komunikoj de UEA, Dokumenta Esperanto-Centro el Durdevac ricevis la ĉi-jaran subvencion el Biblioteka apogo "Roma kaj Poul Thorsen".

Kruno Puškar estas elektita kiel Persono de la jaro 2010 en Križevci, per voĉdonado en la portalo *krizevci.info* pro la gvidita Somera Esperanto-lernejo en 2010.

NAIVA HOMO

 Mihaela Cik

Blanka papero, krajono kaj nostalgia muziko estas pretaj por komenci novan vojaĝon al mondo de puraj senjoj. Kiu scias kion ni nun ekscios?

Ĉio komenciĝas per unu movo de mano.

Li havis mizeran branĉeton en sia mano kaj provis kapti fiŝojn en la lago. Sed liaj pensoj ne estis ĉe la lagoloĝantoj; li pensis nek pri urbanaro kaj tiroj ĉirkaŭ si, kiuj ĉiam lin ĝojigas kaj inspiris, nek pri blankaj floroj de nimfeo sur la laga surfaco.

"Mi devas esti vere freneza se mi pensas ke mi povus esti granda artisto! Jes, mi estas tre naiva. Ja mi estas nur primitiva kamparano kaj mi devus pensi pri miaj bovinoj kaj ekzistado, ne pri koloroj kaj emocioj!" - li ekkriis.

Tie, apud la lago, sur sia tero, li estis libera por fari kion ajn, eĉ krei aŭ desegni. Li prenis sian sakon kaj vento ĉien disŝutis el ĝi paperojn plenajn de notoj kaj desegnaĵoj.

"Ho, nun mi estas certa, ke mia granda revo vere ne estas mia destino!" - li malĝoje konkludis kaj ekiris hejmen, al siaj bovinoj, sen siaj paperoj kaj espero.

Dum li iris tra la arbaro, li ankoraŭ pensis pri siaj revoj - "Mi deziras nur krei belecon. Ĉu tio estas tiel malbona kaj malkomprenebla?"

Tiam, sur la tero, apud alta kverko, li rimarkis sian la plej karan desegnaĵon - la portreton de sia patrino. Sub la desegnaĵo estis la penso de Oscar Wilde, kiun li delonge notis: "Ĉiu portreto, kiu estas desegnita kun sento, estas portreto de artisto, ne de modelo."



"Mi vere desegnis ĝi kun sentoj! Tamen ... tamen mi ne povas rezigni pri la arto. Tio estas mia destino." - li decidis kaj lante ekiris al sia hejmo, al siaj bovinoj kaj eterna inspiro.

La portreto de naiva homo estas finita. Ion ni eksciis.

KAJ LA VESTO KAJ LA ENHAVO ... FARAS LA LIBRON!

 Josip Pleadin

Sen Rodin: NU, KAJ DO? (rakontoj, raporto, recenzoj, revoj). Eldonis: Exit, Cluj-Napoca (Rumanio), 2010. Paĝoj: 160. Formato 16,5 x 20,5 cm. Prezo: 9,90 eŭroj.



La verko kaj la aŭtoro

La unua impresado esence gravas. Kaj la unua impresado pri ĉi tiu libro certe instigos vin ankaŭ tralegi ĝin. Nigre-ruĝa-blanka kombino de frontpaĝaj koloroj, alemanŭ por Esperantaj libroj nekutima formato (16,5 x 20,5 cm), kvalita papero, kudrobindo, aldonaj kovrilklapoj, bonkvalita plastumo, ĉio ĉi libroŝatanton ne lasas indiferenta, des pli se li estas grafika profesiulo kiel mi. La paĝaranĝo bona impreson pri la kompleta paĝaranĝo. La nomo de la eldonisto "Exit" el Cluj-Napoca (Rumanio) por mi ne multe parolas per si mem, sed kombinita kun la unua impresado pri la libro, ja diras multon pozitivan. Verdire, tian eldonadon ne hontus eĉ la plej moderna presejo, se juĝi nur la eksteron.

Pri la nomo de la aŭtoro

unufoje mi serioze ekinteresiĝis kompilante mian verkon "Ordeno de Verda Plumo", kvankam li, en la vera senco de tiu vorto, famiĝis pli poste, kaj kvankam la legataro nun scias, ke li verkis ankaŭ pli frue tute serioze, sed lia unua libroforma verko "Bildoj pri norda lando", destinita por eldono ĉe la fama "Stafeto" multe pli frue, efektive aperis nur ĉe Flandra Esperanto-Ligo en 2007.

Legante lian duan libron "Nu, kaj do?", oni konstante lernas ion novan pri la aŭtoro, kiu finfine elplongas ankaŭ per sia vera nomo. Sen Rodin estas la plumnomo de la itala esperantisto Filippo Franceschi, naskiĝinta en 1932 en Padova, pedagogo, instruisto en baza lernejo dum 30 jaroj. Li esperantistiĝis en la infanaĝo (1940), kaj restis ĝisosta esperantisto ĝis nun, kaj tiu "ĝisosteco" ja klare elstaras el ĉiuj liaj verkoj kaj el lia tuta vivo. Ekde 1958 Esperanto estas lia ĉiutaga

familia vivo, kaj du gefiloj estas denaskaj Esperanto-parolantoj.

Sed, ni komencu ĉe la komenco ...

La libro "Nu, kaj do?" ricevis sian titolon laŭ unu el la eroj en ĝi troviĝantaj. Subtitole la aŭtoro difinas ĝian enhavon per kvar "R" (rakontoj, raporto, recenzoj, revoj), el kio sekvas, ke la enhavo estas diversitaj tekstoj, kiuj supozeble eĉ ne estis planitaj por troviĝi inter la samaj kovriloj.

La libro efektive estas familia projekto. Redaktis la eldonon Julia Sigmond, la edzino de la aŭtoro, ilustris Serena Franceschi, la filino, kaj ankaŭ la verkinto de la antaŭparolo Donald Broadribb povas nombriĝi al la "familianoj", ĉar ie, inter la linioj, la aŭtoro mencias Esperanto-amikon el sia junaĝo, aŭstralianon bonege parolantan Esperanton.

La aŭtoro de la antaŭparolo preskaŭ certas, ke ne ĉiuj eroj de ĉi tiu libro plaĉos al la leganto. Anstataŭ diskuti pri la praveco de tiu aserto, mi nur menciui, ke mi mem, preninte en la manojn la libron tiutage, samvespere kaj dumnokte finlegis ĝin, en unu spiro. Unu el la kaŭzoj de tio (ĉar mi tamen kutimas legi pli leĝere, trankvile, ĉesigante la legadon kelkfoje), estis la fakto, ke multajn personojn kiuj per siaj veraj nomoj aŭ nur per aludoj ĉeestas en la rakontoj, mi mem konas. La alia kaŭzo estas ja preskaŭ senerara lingvaĵo, pruvo ke temas pri estiminda esperantisto, kulturita kaj erudicia. La lingvaĵo estas bunta kaj varia, la frazoj ne nur suprajaj sed profundpensigaj tutaj, sen balasto de sensecaj vortoj kaj asertoj. Mallonge dirite: flue legebla prozaĵo, tamen kun profunde pensigaj temoj, kelkfoje fikciaj, aliffoje ridigaj, plurfoje ankaŭ spurante la tragediojn de homaj vivoj kaj sortoj.

La serenoma ilustristino, estas unu el la denaskaj gefiloj de Sen Rodin, kiun mi ekkonis en Italio dum la UK en Florenco, tiumomente eksciinte ke la plumnoma Sen Rodin estas ŝia patro.

Kiam oni enprofundiĝas en la legadon, konfirmiĝas la aserto de Donald Broadribb, ke "Sen Rodin estas subjektiva verkemulo". Bona verkisto uzas la plej proksimajn rimedojn, la propran sperton, la proprajn zorgojn, dolorojn, travivaĵojn, sed metas ilin en kuntekston de pli vasta scenejo: loka, regiona, monda ... Ĉu verkisto entute povas esti alia? Kaj ĝuste la subjektiveco donas al Sen Rodin la kapablon atentigi pri aferoj kiujn alfrontas simpla homo kunfrapigante kun la sistemo kaj reguloj, kun stultco de burokrato, kun aplombo de grandaj nomoj kaj titoloj.

La eroj de tiu libro estas tre diferencaj, sed ilia variececo donas impulson por legi. Ordigitaj, eble intence, laŭ longeco, ili peremesas al la leganto ke li ne laciĝu leginte ĉe la fino la plej longan. La plej longa (23 paĝoj) "**Perdita ŝanco**" ja troviĝas komence de la libro. Verkita en formo de longa letero al lerneja amiko Otto, ĝi estas fikciaĵo pri la preskaŭ edena lando Karmelinda, en kiu, male al la konata mondo, regas ordo, trankvila vivo, kie homoj okupiĝas pri arto, scienco kaj paca kunvivado.

"**Sekso en la scienca liceo**" parolas pri inversigita sistemo de valoraĵoj, en kiu la tuta sistemo pli kredas la dubkarakteran pedelon ol la lernantojn ankoraŭ ne fiksintaj sian statuson en la socio ... ĝis la momento kiam la "popolo" prenas la aferon en siajn manojn.

"**La ŝtelo-mano**" rakontas pri kaŝitaj herooj. Post ŝtelo de mono en elementa lernejo, por ne provoki polican esploradon, oni elpensis kiel, sen publika malhonorigo de la ŝtelinto, ricevi la monon. Ĉiuj pasis tra unu ĉambro, kaj en skatolon enjettis buligitan ĵurnalpaperon, supozante ke la ŝtelinto kun ĝi enjettos ankaŭ la ŝtelitan monon. Sed, anstataŭ

unu monbileto, en la skatolo troviĝis eĉ tri!

El la propra sperto la aŭtoro parolas pri batalo kontraŭ burokratoj en la rakonto "**Sankta Maria**", kiu rilatas liajn klopodojn ordigi la dokumentojn necesajn por geedziĝo kun rumana civitanino. Legu mem kaj konvinkiĝu ĝis kie povas etendiĝi la stulteca obeemo al sensencaj reguloj kaj leĝoj. La leganto povas ridi, sed la aŭtoro certe ne ridis troviĝante en tiu pozicio.

En la rakonto "**Dek-lira monereto**" en sian memoron Sen Rodin alvokas la sekvencon de sia vivo, kiu povis komplete ŝanĝi ĝin. Li, kun sia unua edzino, la bulgarino Ljuška, en 1961 nur por hazardo ne elmigris al Aŭstralio (tiel do forta estis la aŭstralia amikumado kun esperantisto). Li lasis al dek-lira monero decidi anstataŭ li. Kaj la monero decidis ... ili restis en Italio.

Eĉ du rakontetoj ("**Moderna poŝto**" kaj "**Honesteroj en poŝtejo**") parolas pri poŝtaj tarifoj kaj oficistoj. (Kial tio iomete rememorigas min pri miaj poŝtaj problemoj?). Rakontitaj en humureca stilo, ili tamen atentigas pri tre serioza batalo de unuopa civitano kontraŭ sistemoj.

"**Silanverinoj**" alproksimigas al ni la profundan amikecon de la aŭtoro, kun la geedzoj kiuj pasigas sian tempon en ŝipo kaj eldonas Esperantan gazeton. Kiu ne rekonas en ĝi la afablajn vizaĝojn de Madeleine de Zilah kaj ŝia edzo?

Sekvas pluraj nebeletraj eroj, fakte iaspecaj recenzoj aŭ pritraktaj de Eseprantaj temoj. "**La aventuro de Pinokjo**" pri la du tradukoj, "**Gramsci kaj Esperanto**" pri la sinteno de kunfondinto de la itala komunisto partio Antonio Gramsci al Esperanto kaj pri liaj malĝustaj asertoj.

La librotitola rakonto "**Nu, kaj do?**" komenciĝas sur la paĝo 91, kaj temas pri la ofte papage ripetata konkludo de Tazio Carlevaro pri formorto de Esperanto-movado en 2045. Tre atentinda rakonto, en kiu la aŭtoro

parolas pri siaj propraj spertoj kaj pri sia propra senrenversa kredo, ke Esperanto estas bona ideo, al kiu li restos fidela ĝis la lasta spiro, eĉ se nur unu persono parolus tiun lingvon. Kaj li starigas la lakonan demandon al la konkludo de Carlevaro: "Nu, kaj do?". Mi mem plurfoje en mi mem trovis la saman demandon.

"**Stranga koŝmaro**" parolas pri kripligaj intencoj en uzado de Esperanto, maskitaj per la frazo de "necesoj kaj sufiĉo", "**CISM**" pri la fantazia evoluo de la mondo en 2087, kiam la ĉefa lingvo estas la ĉina.

Sen Rodin ne fuĝas ankaŭ de profunde sociaj eventoj, kia estas la elekto de Barack Obama por la usona prezidanto ("**Vivu la mestizeco!**"), pri siaj rumaniaj impresoj pozitivaj kaj negativaj ("**Kluĵo**" kaj "**Arboj**"), en kiuj li estas eĉ publika pledanto por Rumanio kaj ĝia kritikanto samtempe.

La rakonto "**Mensa eksperimento**" tuŝas la interetnan problemon, ŝovinismojn, kun akcento sur la israela-palestina demando. "**Kreiva kripo**" pledas por bestorajtoj. Ĉu ne morbide uzi la remburitajn kaj murditajn bestojn por kristnaska kripo?

Ĉe la fino estas ses pli-malpli recenzoj pri Esperantaj libroj: "**Esperanto**" (de Ignat Florian Bociort), "**Maitrey**" (tradukta de Ionel Onet), "**Mediterranea breviero**" de Predrag Matvejević, "**Raraj estas tiaj verkoj**" kaj "**Kaj kiu pravus**" (de Eŭgeno de Zilah).


La antaŭlasta ero estas "**La gepardo**", kritiko de la filmo de Luchino Visconti, kaj la lasta "**Biologia testamento**", temanta pri mortigoj pro kompatoj, kaj la persona biologia testamento de la aŭtoro, por kio li venigas nin al pensiga temo pri propra morto.

Sendiskute leginda verko, rekomendata al ĉiu profunde pensanta erudiciulo, al ĉiu kiu vivas Esperanton ne pro ĝia movado, sed pro ĝia kulturo kaj literaturo. Rekomendinda ankaŭ al tiuj, kiuj kunportus ĝin kiel la solan libron al senhoma insulo.

DRAMO DE AMO

 Zdravko Seleš

Kiel gimnazia profesoro pri literaturo mi bone scias, ke la plej granda parto da homoj ĝuste en la lernejoj konstruas sian bildon pri literaturo kaj ke (por verkistoj) pli gravas esti menciita en lernolibroj, ol esti "nur" antologiita. Se temas pri la literaturo de la 20-a jarcento, ekzemple, nur dekonon da Nobelpremiitoj ekkonas laŭprograme la kroataj gimnazianoj. Tial estas tute normale, ke eĉ tre famaj aŭtoroj de la monda literaturo por multaj el la gimnazianoj ne estas konataj, kaj pri la aliaj ni eĉ ne parolu.



La titolpaĝo de la Esperanta eldono

mi ankoraŭ estis knabeto, kaj ŝajnas, ke nenio estas ĝis nun Esperantigita. Tial **La Verda Tritiko** (Le blé en herbe), ŝia malpli konata romaneto el 1923 estis por mi bela legosperto, en kiu, ŝajne, situas la plej gravaj ecoj de ŝia stilo.

Pri kio temas? Du gejunuloj sojle de maturiĝo, kiuj konas sin reciproke ekde la infanaj jaroj, estas konfuzitaj pro la novaj sentoj kiuj naskiĝas. *"Li havas dekse kaj duonan jarojn kaj Vinka ja atingas sian dekkvinan kaj duonan. Ilia tuta infanaĝo ilin unuigis, la maturiĝa aĝo ilin disigas."* Kaj ŝi kaj li rigardas unu la alian alie, alie, ili vidas novajojn, rimarkas la belecon kiuj allogas. *"Samtempe li oferendis al ŝi la manon por la trairado de malkomforta roka koridoro kaj la sango alfluis sub la sunbruno de la vangoj de Vinka. Unu nova gesto, unu nova rigardo sufiĉis por ŝin konfuzi."* Kun granda sentemo Colette peras al ni iliajn pensojn kaj emociojn, iliajn malatentajn

kaj mallertajn agojn, ŝi rimarkas malgrandaĵojn kiuj nekredeble multe parolas, ekzemple kiam lia voĉo raŭkiĝas pro la emocio kiun li ne povas eldiri ...

La stato de ilia amo, ilia situacio, estas tre stranga. Dramoj okazas ĉiutage kaj ĉiumomente kaj samtempe ĉio diras, ke ili estas antaŭdestinitaj unu por la alia: *"Post la tagmanĝo, anstataŭ ol opozicii al la plendoj de sia "deĉiama amato" sian kutiman saĝecon de inteligenta etburĝino, durkapa kaj milda, ŝi eklarmegiĝis je senesperaj konfeso, je amaraj konstatoj kiuj malame parolis pri ilia juneco, ilia estonteco ekster atingeblo, la neeblebla fuĝo, la neakceptebla rezignacio ...* Ŝi kriis: *"Mi amas vin!"* samkiel oni krias *"Adiaŭ!"* kaj *"Mi ne plu povas forlasi vin!"* kun hororplenaj okuloj. Amo, kreskinta antaŭ ili, ravis ilian infanecon kaj gardis ilian junulaĝon de dubindaj amikecoj. *Malpli senscia ol Dafniso, Filipino respektigis kaj mistraktis Vinkan frate, sed tenere ŝin amis, kvazaŭ laŭ la orienta maniero oni estus geedziginta ilin jam ĉe la lulilo ..."* Legante, mi sentis min tenera instiganto de juna



La aŭtorino

Sidonie Gabrielle Colette (1873-1954) estis populara persono de sia epoko en Francujo, kiu tamen, krom pri la literaturo, okupiĝis kaj perlaboris la monon kiel dancistino en muzikteatro, kantistino kaj aktorino. Laŭ la enciklopedio, ŝiaj verkoj plenas je sentebleco kaj vivĝojo. Ankaŭmi mem ne konis ĝis nun ŝian verkaron; en la kroata ekzistas kelkaj tradukoj, sed la lasta aperis kiam



La tro frue forpasinta tradukinto, Roger Imbert



amo, de la emocioj fajnaj, puraj, delikataj, kiaj ne estas materialo por seriozaj amromanoj. Vi ĉiuj verŝajne konas la unuan replikon de la Tolstoja romano **Ana Karenina** pri feliĉaj kaj malfeliĉaj familioj; jes, ni alktimigiĝis al tragedio kiel pli artkonvinka. La virgeco de la du junaj animoj ravas la leganton, faras ke eĉ sperta leganto vivas en espero pri "happy end", pri la ebleco de iu paradiza stato... Sed, ne eblas. En la paradizon venas serpento, la idilion disfalgas la reala vivo.

Kaj ankaŭ tie Colette daŭrigas sperte, senteme, bone konante la homan (viran kaj virinan) psikologion; okazas ke "Vinka, religio de la tuta infanaĝo" estas "forlasita por la drama kaj

necesa ebrio de unua aventuro". La rakonton envenas sperta virino, delogistino, sed ankaŭ ŝi estas bone psikologie nuancita: ankaŭ ŝi ne povas trairi la vivon sen vundoj; eĉ sciante ke temas nur pri aventuro, ŝi esperas pri vera amo. Ekestas la ama triangulo, sed mi ne rerakontos al vi plu; se vi tralegis, vi scias kio okazis; se ne, mi jam diris tro, kvankam tio povus esti eĉ bona "hoko". Mi diru nur, ke kontinuas psikologie viviginta rakontado, la vera dramo de amo.

Mi vere ĝuis kaj dankas al la tradukinto Roger Imbert. Nome, mi preskaŭ ne verkis ĉi-tiun tekston. Tro da okupiĝoj, malmulte da libera tempo. Konata rakonto. Sed, ĝuste Roger estis mia "hoko" por tralegi la

romaneton de Colette. Se li elektis tion por Esperantigi, certe estis pro la ŝato kaj simpatio, kaj la simila simpatio kaj danko por du semajnoj de la instruista gvidado kaj amikeco, dum mi estis preskaŭ samjara kiel Filipo, en Primoŝteno 1979, kunigis niajn vivojn. Jam multfoje en mia vivo ĝuste la simpatio, la amo, la emo - estis miĝaj gvidantoj, kaj faris mian vivon pli bona kaj pli bela. Tiel ankaŭ ĉi-foje okazis, ke ĉirkaŭ Esperanto, la bela revo de mia junaĝo, interplaktiĝis la kurblinioj, kiuj tra la bona kaj leginstiga traduko de Roger kaj la fajna rakontado de Colette donis al mi plezuron kaj ekscitiĝon dum la legado, kiu estas la plej bona rekomendo ankaŭ por vi, kara leganto.

SARAJEVA ESPERANTO-MOVADO TAMEN MOVIĜAS

 Smail Grbo

Post ioma stagnado pro la kompreneblaj kialoj (milito, pereco aŭ morto de kelkaj aktivuloj, perdo de ejoj, apartiĝo de gesamideanoj el Respubliko Serba), Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino tamen havis kelkajn gravajn sukcesojn postmilitajn. Jen nur kelkaj eventoj: eldono de la libro "Spite al ĉio, Bosnio", internacia seminario tuj post la zagreba UK, IJK en 2006 ktp. Dum kelkaj jaroj funkciis la geknaba klubo "Kolombido" (kiun gvidis Smail Grbo) kaj la oldulo kaj ĉiama aktivulo Mustafa Resulović (86) eldonis nacilingvan libron "Piŝem, dakle postojim" kiu enhavas ankaŭ 10 liajn Esperantlingvajn artikolojn, dum Smail Grbo preparis kaj baldaŭ eldonos "S esperantom po Aziji" (okaze de sia 50-jara esperantistiĝo).

Jen la plej freŝaj belaj novaĵoj el Sarajevo: de la 29-a ĝis 31-a de oktobro en hotelo "Terme" en Ilidža apud Sarajevo okazis Ronda tablo "Eŭropa Unio ĥieraŭ, hodiaŭ kaj morgaŭ - lingvaj kaj kulturaj aspektoj". Krom bosniaj esperantistoj (Sarajevo, Zenica, Visoko, Bugojno, Banja Luka, Klobuk) partoprenis (kaj prelegis aŭ diskutis) prof. d-ro Michel Duc Goninaz el Francio, prof. d-ro Fabrizio Pennachietti el Italio, prof. Maria Butan el Rumanio, prof. Bojidar Leonov el Bulgario, Nikola Rašić el Nederlando, Zlatko Tišljar el Slovenio, Judita Rey Hudaček el Kroatio, István Ertl el Luksemburgio, Bardhyl Selimi el Albanio, Barbara Pietrzak el Pollando, Eduard Kusters el Belgio, Oskar Puig el Hispanio-Katalunio, Dorde



Dragojlović kaj Jovan Zarković el Serbio.

La partoprenintoj vizitis Malnovan Urbon (Baŝarŝija) kaj Esperanto-centron Sarajevo (novaĉetitan) en la urbocentra kvartalo Marindvor, (Kralja Tvrtka, n-ro 19, p.f. 452, 71000 Sarajevo, telefono/fakso +387 33 205 487, info@esperanto.ba). Tiutage estas internacie inaŭguritaj belaspektaj Esperanto-ejoj (oficejo, kuirejo, salono, necesejo). La 30-an de oktobro 2010 okazis solena kunveno okaze de la 100-jara jubileo de la Esperanto-movado en Bosnio kaj Hercegovino, kun salutparoladoj, referaĵo pri la evento, atribuo de la rekonjo, komuna vespermanĝo, muziko.

Gravas ankaŭ mencii, ke inter la 30-a de julio kaj 6-a de aŭgusto 2011 en Sarajevo okazos la 84-a SAT-kongreso.



NADA MED (1927-2010)

La 11-an de novembro 2010 en Vinkovci, post longa kaj malfacila malsano, en sia 83-a jaro mortis profesorino Nada Med.

Nada Med, naskiĝis la 13-an de marto 1927 en Vinkovci, kie ŝi finis elementan lernejon kaj gimnazion. Poste ŝi studis en Zagrebo ĉe la Filozofia fakultato la kroatan lingvon (1945-1950). Kiel profesorino de la kroata lingvo, la unuan laborlokon ŝi ricevis en Slavovski Brod kaj tie ŝi ekkonis tre konatan esperantistinon Olga Ulrih, ĉe kiu ŝi esperantistiĝis en la jaro 1950. A,B kaj C ekzamenojn de Esperanto ŝi finis en Zagrebo. En la jaro 1952 ŝi posteniĝis kiel profesorino en Vinkovci.

Post la reveno al sia naskiĝurbo kaj eklaboro kiel profesorino, ŝi konstante gvidis Esperanto-kursojn por lernantoj kaj ankaŭ por aliaj civitanoj. Ŝi fondis Esperanto-societon en Vinkovci kaj dum pluraj jaroj ŝi gvidis ĝin kiel prezidantino aŭ kiel sekretario. Ŝi ankaŭ aranĝis plurajn renkontiĝojn de esperantistoj en Vinkovci, organizis prelegojn de tre elstaraj personoj parolantaj Esperanton

kiel Tibor Sekelj, bulgara opera kantisto Veselin Damjanov ktp.

Dum pluraj jaroj ŝi flegis tre sincerajn rilatojn inter la esperantistoj de Slavonio kaj Srem. Ŝi estis membro de la unua redakta teamo de la revuo "VOĈO" en Borovo kaj partoprenis plurajn UK-ojn, SAT- kaj landajn kongresojn kaj renkontiĝojn.

S-ino Nada Med estis alte estimata en sia vivloko, kio evidentiĝis ankaŭ dum ŝia lasta vojaĝo, la vojaĝo al nova, eterna hejmo en la tombejo de Vinkovci, kiun partoprenis centoj da urbanoj. Bedaŭrinde, neniu eldiris eĉ unu vorton pri Esperanto, al kiu ŝi dediĉis la plej grandan parton de sia vivo.

Al ŝiaj du filinoj vivantaj en Zagrebo kaj Manhajmo, samkiel al ŝia edzo, profesoro Roman Med, ni elkore direktas niajn kondolencajn kunsentojn.

Duŝan Adnadj kun la familo kaj Aleksije Herić



MILIVOJ LOZOVINA (1925-2010)

Milivoj Lozovina naskiĝis en Seget Donji la 27-an de julio 1925. Li partoprenis la duan mondmiliton en la partizana armeo ekde 1943. Dum la militaj

jaroj li partoprenis pedagogian kurson kaj postmilito estis kultura aganto en Vrljka. En 1957 li diplomigis en la Agronomia fakultato de Zagrebo, fariĝinte diplomita inĝeniero pri agronomio kaj en 1965 li doktoriĝis pri biologiaj sciencoj en la Bioteknologia fakultato de Zagrebo. Ĝis la jaro 1975 li laboris en la Kemia instituto de Agronomia fakultato en Zagrebo kiel teknika kaj faka kunlaboranto, asistanto kaj tie ĉesis labori kiel docento. Inter 1975 kaj 1978 li estis direktoro de Lerneja centro por agrikulturo, kooperativismo kaj nutroindustrio en Novi dvori, Zagrebo. De 1978 ĝis 1981 li estis direktoro de la Unuiĝo por agrikulturo kaj kooperativismo de Agrikultura-nutrada klerigcentro Zagrebo. Ekde 1981 li laboris kiel scienca-instrua laboranto en Agronomia instituto de Zagreba Universitato en Križevci. En kadro de agrikultura kemio li okupiĝis pri birdoj, speciale pri

birdobredado, pri kio li skribis multajn artikolojn kaj ankoraŭ pliajn tradukis el lingvoj itala, franca, angla, germana kaj rusa. Li estis aŭtoro aŭ kunaŭtoro de deko da lernolibroj kaj lerniloj por studentoj de agronomio kaj verkis plurajn fakajn kaj sciencajn verkojn el la kampoj de kemio kaj teknologio de agrikulturaj produktoj. Vaste kunlaboris kun deko da agrikulturaj organizaĵoj kaj fabrikoj. Esperanton li komencis lerni en 1939 per koresponda kurso ĝis la malpermeso de Esperanta agado. Post la dua mondmilito li mem perfektigis kaj faris A kaj B-ekzamenojn en Zagrebo. Membro de Esperanto-societo "Bude Borjan" en Zagrebo ekde 1950. Li estis landa delegito de Ornitologia Rondo Esperantlingva (ORE) por Jugoslavio. Dum multaj jaroj li estis membro de Nomenklatura komisiono de ORE kaj membro de la komisiono por Nova Biologia Nomenklaturado. Dumviva



membro de ORE. Li pensiĝis en la jaro 1992. Dum siaj pensiaj jaroj li estis ofta vizitanto de Esperantaj renkontiĝoj kaj de multaj jaroj li okupiĝis pri fotado. Al Dokumenta Esperanto-Centro li donacis plurajn fotojn por nacia foto-arkivo pri Esperanto, kaj en 2009 Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj en Osijek atribuis al li veteranan diplomon por pli ol 50-jara poresperanta laboro.

MARIJA REPAC (1937-2010)

Marija Repac naskiĝis la 15-an de januaro 1937. Ŝi finis ekonomikan mezlernejon kaj laboris kiel bankoficisto. Ŝi esperantistiĝis kune kun sia edzo Branko en 1983., kaj ili ambaŭ estis membroj de Esperanto-societo "Bude Borjan" en Zagrebo. Aktivaj vizitantoj de diversaj Esperantaj renkontiĝoj kaj programoj, ili estis membroj de Universala Esperanto-Asocio. Ambaŭ vidhandikapitoj, ili aktivis ankaŭ en blindulaj rondoj. Marija forpasis la 12-an de novembro 2010.



VOJISLAV BOROVAC (ĉ.1935-2010)

Vojislav Borovac, pensiita instruisto el Osijek, naskiĝinta ĉirkaŭ 1935, forpasis en aŭgusto 2010. Li estis malnova esperantisto, lerninta la Internacian Lingvon aŭtodidakte. Li gvidis plurajn kursojn por lernantoj de Elementa lernejo "I. G. Kovačić" en 1958. Tiujare



li fariĝis ankaŭ membro de Esperanto-societo "Liberiga Stelo" en Osijek, kaj ekde 1961 li gvidis grupon de esperantistoj en abiturientaj klasoj de Porinstruista lernejo en Osijek, el kiuj rekrutiĝis postaj kursgvidantoj en vilagaĵaj lernejoj tra Slavonio. Inter 1958 kaj 1962 li estis sekretario de Esperanto-societo "Liberiga stelo" en Osijek. Lastfoje inter esperantistoj li aperis en 2009, kiam li, kun aliaj veteranoj, tenis la Esperantan flagon ĉe la proklamo de Esperanto-strato en Osijek.

Pro la neregula aperritmo de nia revuo, kun malfruo ni notas ankaŭ aliajn forpasintojn en 2010.

MIRA MANNER MATANOVIĆ

Naskiĝinta la 17-an de oktobro 1925 en Bugojno (Bosnio kaj Hercegovino). Ŝi finis filozofian fakultaton (pedagogio kaj psikologio). Esperantistino de 1954. Vidvino de la konata kroata esperantisto Mirko Mamužić, konata ankaŭ inter svisaj samideanoj kiel Emerik Manner. S-ino Mira estis ofta vizitanto de Universalaj Kongresoj kaj granda mecenato de la Esperanto-movado en Kroatio. Ŝi estis enterigita la 6-an de majo 2010 en la zagreba tombejo Miroševac.


DAMIR VEIDLICH, karesnomita Daĉjo

Denaska esperantisto, filo de malnova esperantisto Josip Vajdlj (=Weidlich). Li forpasis la 19-an de majo 2010 en Zagrebo en aĝo de 59 jaroj, kaj estis kremaciita la 24-an en la Zagreba krematorio.

MATO BRČIĆ-KOSTIĆ

En aĝo de 98 jaroj en Zagrebo la 19-an de majo 2010 mortis unu el la plej aĝaj kroataj esperantistoj, Mato Brčić-Kostić, doktoro pri matematikaj sciencoj. Esperantisto de 1952, aktiva movade en Vojvodino. Membro de la AIS San Marino. En Kroatio li vivis ekde 1994.

Sidonie Gabrielle
Colette



La Verda Tritiko

Prezo: 50,00 kunaoj / 7,50 eŭroj
Triona rabato ekde tri ekzempleroj
Enlandaj sendokostoj: 10%
Eksterlandaj sendokostoj: 15%

Mendu ĉe:
grafokom@kc.htnet.hr